# JARRAPORTO
## KALENDARA JARO **2018**

**Tutmonda Esperantista Junulara Organizo**
Nieuwe Binnenweg 176
3015 BJ Rotterdam
Nederlando
www.tejo.org

Kompilita de:
*Charlotte Scherping Larsson kaj Konstanze Schönfeld*

Verkita de:
*Ana Ribeiro, Antonia Montaro, Ariel Palmer, Bui Mung, Carlos Pesquera Alonso, Charlotte Scherping Larsson, Clément Baleyte, Francesco Maurelli, Gilbert Nyukuri, Karina Oliveira, Klára Ertl, Konstanze Schönfeld, Léon Kamenický, Łukasz Żebrowski, Manuela Burghelea, Mia Nordentoft, Michael Boris Mandirola, Mounir Abjiou, Paulína Jalakšová, Rogier Huurman, Quentin Weber-Seban, Rakoen Maertens*

Loko, la -a de aprilo 2019

# Enhavlisto

**Enhavlisto** 2

**Enkonduko** 5

**Parto 1: Funkciado** 6

**Administrado** 6

- Balotoj por la nova estraro 6
- Cirkulero 6
- Elekta Komisiono 6
- Kunlaborplatformo 7
- Komitato 7
- Realigplano 7
- Reglamento 7

**Financoj** 8

**Oficistoj** 8

- Dungoj 8
- Ariel Palmer 9
  - Celoj de la komunikado 9
  - Enhavoj kaj agado 9
  - Atingoj 10
  - Grafikaj laboroj 10
  - Videoj 11
  - Kunlaboro kun la estraro 11
- Łukasz Żebrowski 12
  - Landa Agado 12
  - Projekto AEJK (Afrika-Eŭropa Junulara Kunlaboro) 12
  - Aliaj ĝeneralaj taskoj 12
- Mounir Abjiou 12
- Quentin Weber-Seban 13

**Volontuloj** 14

- Loĝado kaj laborloko 14
- Alvoko kaj elektoj 14
- Mentoroj 15
- Fériel Djenidi 15

Gilbert Niyukuri 15
Paul Helly 15
Olga Sevcenco 16
Vasiliki Tamvaki 16
Clément Baleyte 16
Mia Nordentoft 18
Manuela Burghelea 18

**Rilatoj kun UEA** **18**

**Parto 2: Komisionoj** **19**

**Aktivula trejnado** **19**

**Kongresoj** **20**
IJK 2018 20
JES 2018/2019 20
Partoprenu IJKn 21
Preparlaboroj por IJK 2019 21

**Eksteraj rilatoj** **22**
UNITED 22
UN & Unesko 23
UNOY 23
Forumo Junulara Eŭropa 24
YO!Fest kaj EYE 2018 25

**Landa Agado** **26**
Afriko 26
Azio 26
Eŭropo 26
Nordameriko 26
Oceanio 26
Sudameriko 26

**Merkatiko kaj Informado** **26**
Kontakto 27
Intervjuoj 27
Ĉeftartikoloj 28
Movada Rubriko 28
TEJO-aktuale 29

**Projektoj** **29**
Kunlaboro kun Kosmo 29

Afrika-Eŭropa Junulara Kapabligo (AEJK-projekto) 30
Florigu Egalecon inter Junuloj (FEJ-projekto) 30
Volontula Lingvoinstruado (LI-projekto) 31

Talento **31**

**Parto 3: Interesgrupoj kaj Servoj** **33**

**Adoleska agado** **33**

**Edukado** **33**

**Genra egaleco** **33**

**Kulturo** **34**

**Moviĝeblo** **34**

**Pasporta Servo** **34**

Scienca kaj Faka agado **35**

**Mallongigoj** **36**
Kromnomoj de personaj nomoj 36
Mallongigoj de organizoj kaj organoj 36

# Enkonduko

Post la rezigno de la prezidanto Enric Baltasar (elektita en 2017) dum JES 2017/2018 kaj la tujposta rezigno de la estrarano Doniben Jimenez Jaramillo, la estraro bezonis reordigi la taskaron inter si tute komence de la jaro 2018.

Antaŭa Ĝenerala Sekretario Hoan Tran (Ĝojo) iĝis prezidanto; antaŭa estrarano Charlotte Scherping Larsson transprenis la postenon de Ĝenerala Sekretario. Post pluraj monatoj, post starigo de malferma alvoko por novaj estraranoj kaj reta voĉdonado, Marc Konijnenberg kaj Cyprien Guiya estis alektitaj al la estraro.

Estis malfacila kaj peza jaro por multaj estraranoj el la mandato 2017/2018, kun multe da necerteco pri kiam kaj kiel la estraro povus funkcii en pli-malpli normala maniero. Tio influis la laboron por gvidi la organizon.

Post renovigo de la estraro dum IJK 2018, la laboro en la organizo konis novan elanon. Tamen, dum la unuaj monatoj, evidentiĝis ke pluraj teamanoj ne disponis je tiom da libera tempo por esperanta agado, kiel planite. Pro tio, malfacilis enkonduki neeŭropajn novestraranojn al TEJO-laboro. Ankaŭ pro tiu malkonvena situacio, dum JES 2018 la Komitato voĉdonis por eksigi la estraranon Arturo Crespo.

*Charlotte Scherping Larsson kaj Konstanze Schönfeld*

# Parto 1: Funkciado

## Administrado

*raportas Charlotte Scherping Larsson, Ĝenerala Sekretario (2018) kaj Konstanze Schönfeld, Ĝenerala Sekretario (2018-2019)*

### Balotoj por la nova estraro

Dum IJK 2018 en Badaĥozo, Hispanio, elektiĝis al la estraro de TEJO:

- Hoan Tran (Vjetnamio) – Prezidanto
- Léon Kamenický (Slovakio) – Unua Vicprezidanto
- Francesco Maurelli (Usono) – Dua Vicprezidanto
- Konstanze Schönfeld (Germanio) – Ĝenerala Sekretario
- Mung Bui (Vjetnamio) – Kasisto
- Arturo Crespo (Kolombio) - Estrarano
- Hans Becklin (Usono) – Estrarano
- Kingslim Edah (Benino) – Estrarano
- Olga Sevcenco (Nederlando) – Estrarano

Kompleta listo de respondecoj de ĉiu estrarano videblas ĉe la Listo de respondecoj de la Estraro 2018-2019 de TEJO.

### Cirkulero

La aktivuloj de TEJO – estraranoj, komitatanoj, komisiitoj, volontuloj kaj oficistoj – regule raportas pri siaj agadoj en publika formo. Iliaj raportoj aperas en la formo de la monata cirkulero, dissendata pere de la komitata diskutlisto. Ĉiuj arkivaj numeroj de 2018 estas legeblaj ĉe:

- la Komitata Listo
- la Trello-tabulo "TEJO-Cirkulero"
- ekde fino de la jaro 2018, ĉe la Centra Reto

### Elekta Komisiono

*raportas Michael Boris Mandirola, membro de la Elekta Komisiono 2017-2018, kaj Rogier Huurman, membro de la Elekta Komisiono 2018-2019*

La Elekta Komisiono 2017-2018 konsistis el Fernando Jorge Maia Pedrosa Jr., Michael Boris Mandirola, Arina Osipova kaj Carlotta Pavese. Komence de la jaro 2018, la Elekta Komisiono aktiviĝis por serĉi novajn estraranojn sekve al la demisioj de Enric Baltasar kaj Doniben Jiménez.

Malferma alvoko estis lanĉita kaj la komisionanoj aktive kontaktis potencialajn kandidatojn; fine sin proponis kvar kandidatoj, el kiuj unu retiriĝis antaŭ la balotoj.

Poste la Elekta Komisiono serĉadis kandidatojn por la someraj elektoj de la nova Estraro. La Elekta Komisiono havis kontakton kun 36 potencialaj kandidatoj kaj fine 14 homoj kandidatiĝis al la Estraro de TEJO 2018-19 (kvankam unu el ili retiriĝis antaŭ la balotoj).

En 2018 ni (Michael Boris, Querino, Roĉjo kaj Saŝa) elektiĝis kiel nova Elekta Komisiono pere de reta voĉdono post reta malferma alvoko. Ni tuj kreis babilgrupon por rapida komunikado inter ni, kaj ni kreis komunan dokumenton por kolekti informojn pri eblaj kandidatoj. Dum JES 2018/19 ni parolis kun tiuj eblaj kandidatoj, kiuj ĉeestis, kaj ni gajnis multajn utilajn informojn. Neniu estrarano eksiĝis ĝis la fino de 2018.

## Kunlaborplatformo

Metodo kaj platformo por raporti pri sia agado pere de cirkulero estis ŝanĝita unue al pli aŭtomata sistemo pere de Google Forms kaj Zapier, kiu estis uzita dum la somero. Kun la alveno de nova volontulo, Mia Nordentoft el Danio, laboro pri tutnova pli moderna aŭtomata sistemo estis komencita. La Centra Reto estis prezentita al la komitata publiko dum JES 2018.

## Komitato

Renoviĝo de la Komitato, nome la renomumo de ĉiuj Komitatanoj A, estis malfacila kaj temporaba. La laboro por konfirmi la Komitatanojn kaj dialogi kun la Landaj Sekcioj estis daŭrigita dum la tuta 2018 ĝis jarfina stabiligo de la nombro de Komitatanoj.

Nova voĉdonsistemo, kiun TEJO aĉetis de Judith Meyer, ebligis efikan voĉdonadon por Komitatanoj B. Elektiĝis Michael Boris Mandirola kaj Robert Nielsen, kiuj oficis meze de 2018. El la 5 lokoj disponeblaj, 3 restis vakaj: kandidatiĝoj estis denove kolektitaj en septembro 2018 kun la espero reokazigi la voĉdonadon ĝis fino de la jaro aŭ dum la komenco de 2019.

## Realigplano

Laboroj por verki novan realigplanon komencis en oktobro-novembro kaj finiĝis tuj antaŭ JES 2018. La realigplano estis aprobita de la Komitato dum JES 2018 kaj disponeblas publike en la retejo de TEJO.

## Reglamento

En 2018, okazis ordigo de la reglamento, post ke bezono estiĝis pro la multaj pasintjaraj ŝanĝoj, kiuj estis enkondukitaj. Dum la Komitatkunsido en IJK 2018, kelkaj ŝanĝoj estis proponitaj kaj aprobitaj. Ankaŭ dum JES 2018 estis prezentitaj nur kelkaj malgrandaj ŝanĝoj, sed laborgrupo estis lanĉita por verki novajn regulojn pri elektoj, kiuj aperos en 2019.

## Financoj

*raportas Bui Mung (Feliĉa), kasisto (2017-2019)*

De IJK 2018 mi daŭre estis elekita kiel kasisto por mia dua mandato en TEJO estraro. Mi daŭre prilaboras kutimajn takstojn de kasisto, kiel buĝetadon, financan raportadon, helpon al librotenado de la financa fako de UEA; mi ankaû kontrolas, aprobas kaj repagas kostojn al membroj, volontuloj, oficistoj kaj kostoj en CO kaj en TEJO-apartmento; sekvas alvenon kaj uzon de subvencioj kaj donacoj.

En 2018, ĉefaj enspezoj de TEJO venis de subvencioj (EVS-subvencoj, EACEA-subvencioj), membrokotizoj, gajno de projektoj Erasmus+ kaj gajno de IJK 2018. Danke al nia subvencipetisto Mounir, en 2018 ni sukcesis subvencipeti 28.200 EUR el EVS-programo kaj 44.973 EUR el EACEA por la administra subvencio. La subvencoj helpas kovri parton de volontuloj kostoj, de salajraj kostoj kaj kontribuas al la kostoj de estrarkunsidoj. TEJO ankaŭ partoprenis en EJO 2018 kaj ricevis pli ol 4000 EUR por kovri pretigajn kaj surlokajn kostojn de TEJO-membroj. Krome en tiu ĉi jaro ni sukcesis organizi karavanon al IJK kaj havas gajnon de pli ol 1000 EUR.

En 2018, TEJO ankoraŭ havas minuson, sed kompare kun 2016 kaj 2017 TEJO vere klopodis malaltigi la minuson per malaltigado de kostoj de oficistoj kaj volontuloj. TEJO kundungas oficistojn kun UEA kaj ricevas subtenon de KER-oficisto kaj UEA-oficistoj. Krome TEJO malaltigis poŝmonon de volontuloj de 550 EUR al 300 EUR monate. Tio grande helpas malaltigi la du ĉefajn kostojn de TEJO.

Ĉiuj detaloj pri financoj aperos en la aparta financa raporto, kiu baldaŭ estos publikigita post la finkalkulado kaj interkonsentado kun UEA.

## Oficistoj

*raportas Charlotte Scherping Larsson, Ĝenerala Sekretario (2018), Konstanze Schönfeld, Ĝenerala Sekretario (2018-2019) kaj Bui Mung (Feliĉa), kasisto (2017-2019)*

### Dungoj

En 2018, la plano estis dungi multe pli da homoj ol fine estis dungitaj. Inter alie estis planita dungi programiston, sed pro prokrasto de aprobo de la administra subvencio, ni devis tro atendi por konfirmi la dungon, kaj fine estis decidita neniun dungi. Interalie ni taksis la bezonon malalta post kiam Judith Meyer zorgis pri nova balota sistemo, kiun ni uzis en junio por la elekto de komitatanoj B.

Por la dungo de programisto estis intervjuitaj kvar kandidatoj, kiuj ĉiuj estis vere bonaj kaj pripensindaj. Enplektitaj en la intervjuprozeco estis Charlotte Scherping Larsson kiel respondeca estrarano pri Talento, Francesco Maurelli kiel Vicprezidanto kaj Paul Helly kiel Komisiito pri Teknologio.

Ankaŭ estis plano dungi taŭgan kunordiganton de la volontuloj en Roterdamo kaj aldonan subvencipetiston. Ekde somero estis dungita en Roterdamo Said Baluĉi por la unua rolo; por la dua rolo neniu kandidato montris sin sufiĉe sperta. Estis

planoj spertigi la solan kandidaton Veronika Venislovas laŭ volontula bazo unue, celante ŝian rekandidatiĝon en posta momento.

Resumo pri dungoj en 2018:

- Giorgio Nikolov (Ariel) - oficisto pri komunikado (tutjare)
- Lukasz Zebrowski - oficisto pri Landa agado (ĝis aŭgusto 2018)
- Mounir Abjiou - oficisto pri subvencioj (tutjare)
- Said Balouchi – kunordiganto de la volontuloj en CO – oficisto de UEA kaj TEJO (ekde junio 2018)
- Quentin Weber-Seban - oficisto pri Eksteraj Rilatoj (tutjare)

## Ariel Palmer

*raportas Ariel Palmer, oficisto pri Komunikado (ekde 2017)*

### Celoj de la komunikado

Miaj celoj por la komunikado de TEJO estis plibonigi la konscion de TEJO inter siaj membroj, plibonigi la sintenon al la organizo, kaj ankaŭ ke la sociaj retejoj de TEJO iĝu centro de diskutoj kaj ejo kie oni promocias debatojn, valorigas la interesojn, opiniojn kaj voĉojn de la esperantistoj.

Por engaĝiĝi la komunumon mi kreis kaj kunhavigis diversspecajn enhavojn, kiujn mi publikigis en niaj sociaj retejoj (Facebook, Twitter, Instagram, VK) kaj en la oficiala retejo.

### Enhavoj kaj agado

Kiel jam la antaŭa jaro, mi aktive kunhavigis kaj helpis disvastigi enhavojn jam kreitajn de homoj en la Esperanto komunumo, kaj aliflanke mi fokusiĝis pri kreado de novaj enhavoj (videoj, citaĵo-bildoj, gramatikaĵoj, starigo de demandoj kaj diskutoj, kaj tiel plu).

Ĝenerale la jaro 2018 estis bonega por eksperimentoj kun enhavoj. Kompare al 2017 kiam enhavoj estis planitaj kaj pli laŭorde alterniĝis, dum 2018 ni alternis pli libere sociretajn enhavojn kiel bildoj, frazoj, personaj spertoj de esperantistoj, videoj, kaj kutimajn, instituciajn TEJO-enhavojn (informoj, alvokoj, varbado pri aktivaĵoj, kaj tiel plu).

Evidentiĝis dum 2018, sen iu ajn dubo, ke enhavoj kiuj montras personan sperton de Esperantistoj, estas tio, kion la TEJO-sekvantaro (kaj verŝajne la tuta Esperanto-movado?) volas vidi.

La videoj kiujn ni realigis dum la jaro atingis multajn homojn kaj montriĝis kiel kerna parto de nia komunikado. Ekzemple la videoj "Kiel mi iĝis Esperantisto" kaj "Iĝu la ŝanĝo kiun vi volas vidi en Esperantujo" de Charlotte Scherping instigis multajn bonajn reagojn kaj diskutojn.

Mi komencis demandi al homoj kial kaj kiel oni lernis Esperanton. Homoj amase diskutis kaj kontribuis. Mi kolektis la rakontojn kaj komencis publikigi rakont-bildojn. Miloj da homoj interagis kaj kunhavigis tiujn kelkajn bildojn kaj

aperis multaj rilataj diskutoj. La bildoj aperis neregule sed ĉiam sukcese. Mi planas fari similajn etajn enketojn dum 2019 kaj krei rilatajn materialojn por sociaj retejoj.

Bone nia publiko reagis al la video filmita dum JES en Pollando pri la novaĵoj kaj planoj de TEJO por 2018. Montri plie la homan dimension de nia organizo estas unu el miaj celoj por la komunikado de TEJO ekde la komenco de mia laboro en 2017. Bedaŭrinde estas malfacile realigi pli da materialo pri la agado de TEJO ĉar la estraro renkontiĝas kutime nur okaze de Estraraj Kunsidoj, kaj mi ne ĉiam povas ĉeesti, sed certe de la laboro de 2018 mi komprenis la gravecon de tiaspecaj enhavoj.

Aldone, parto de mia laboro por TEJO estas ankaŭ interagi kun uzantoj en sociaj retejoj, respondi al demandoj, varbi kaj kuraĝigi homojn partopreni en la aktivaĵoj de TEJO.

Mi kreis alvokojn, artikolojn en tejo.org, aldonis paĝojn kaj informojn por eventoj en la tuta mondo kaj helpis varbi ilin.

Mi faris fotojn dum esperantaj renkontiĝoj. Fotoj helpis porti bonegan trafikon, engaĝiĝon kaj interagojn al niaj paĝoj. Dum renkontiĝoj mi ankaŭ realigis fotojn kiujn mi poste uzis por komunikaj materialoj kaj alekstera komunukado (ekzemple, hispanaj ĵurnaloj uzis mian fotojn de IJK2018 por raporti pri la evento).

Interagoj kreskis multe en ĉiuj sociaj retejoj, homoj ofte komentis, kunhavigis afiŝojn, diskutis pri diversaj temoj. Alvokoj ĝenerale atingis pli da homoj ol antaŭe kaj tial ni ricevis pli da kandidatiĝoj por postenoj, volontulado kaj ĝenerale por partopreno en TEJO-aktivaĵoj.

**Atingoj**

En Facebook ni gajnis pli ol 1000 sekvantojn. Komence de la jaro ili estis ĉirkaŭ 3700 kaj fine de la jaro ili estis pli ol 4700 (bona rezulto se oni taksas ke ni havis nur unu pagitan afiŝon en la tuta jaro).

Ni gajnis pli ol 550 sekvantojn en Twitter dum la jaro kaj la interagoj tie pligrandiĝis kompare al la antaŭa jaro.

Ankaŭ nia sekvantaro en Instagram multe pligrandiĝis dum 2018 kaj ni gajnis preskaŭ 500 novajn sekvantojn tie.

**Grafikaj laboroj**

Mi prilaboris la retejon por la projekto FEJ - Florigu Egalecon inter Junuloj kaj aldonis enhavojn. Mi faris novan flugfolion pri TEJO. Mi kreis logoojn por la projekto FEJ, kaj por landaj sekcioj BOJE, DKEJO, JEBO, EAS kaj JEB. Mi kreis novajn T-ĉemizojn por TEJO (diversaj versioj, desegnoj kaj grafikaĵoj). Mi kreis t-ĉemizojn de IJK2018.

Por EYE2018 mi kreis flugfoliojn, vizitkartojn, posterojn, gaĝetojn kaj novan prezentaĵon de TEJO. Mi ankaŭ desegnis TEJO pinglojn/gadĝetojn uzeblaj dum EJO kaj aliaj eventoj. Mi faris grafikaĵojn por la E-ateliero en Roterdamo kaj helpis varbi rete. Mi kreis flugfolion pri atentema kunestado kadre de projekto FEJ.

Mi varbis por IJK 2018 kun afiŝoj, memorigoj, grafikaĵoj. Por IJK mi ankaŭ kreis nomŝildojn, kaj reklaman grafikaĵon por afiŝo (la spektaklo Utopio) kaj faris biletojn por ĝi. Mi kreis posterojn por UK pri TEJO kaj pri la agado de landaj sekcioj. Ekde fine de 2018 mi komencis varbi por IJK 2019.

**Videoj**

Mi kreis reklamfilmeton por IJK2018 en Badajoz kaj reklamfilmeton por SES2018. Daŭrigis dum la jaro la kolekto de materialo por la projekto "The world of Esperanto". Mi prizorgis video-sinprezentan kampanjon por kandidatoj al la estraro 2018-2019 (laŭ bonega ideo de Michael Boris Mandirola de la Elekta Komisiono). Mi kreis videon de la nova estraro 2018-2019 (filmita dum IJK) en kiu ĉiu nova estrarano sinprezentas. Mi filmis la videojn "Kiel mi iĝis Esperantisto" kaj "Iĝu la ŝanĝo kiun vi volas vidi en Esperantujo" de Charlotte Scherping.
Decembre mi varbis, kolektis materialon, muntis, finpretigis kaj disvastigis la videon "Esperanto estas mojosa!" por la Zamenhofa Tago, kun dekoj da kontribuoj de esperantistoj de la tuta mondo. La video estis kunhavigita pli ol 420 foje kaj havis 14000 spektojn en Facebook kaj pli ol 2 mil en YouTube - vera sukceso por esperantujo. Danke al ĝi ni atingis multajn homojn kaj gajnis novajn sekvantojn.

Evidentiĝis dum 2018 ankaŭ la graveco de bona komunikado pri niaj Erasmus+ projektoj. Dum la jaro mi realigis videon pri AEJK projekto, kun intervjuoj al Pierre kaj Jeremie kaj rakonto pri la disvolviĝo kaj la graveco de la projekto. Mi realigis ankaŭ videon pri nia projekto pri Plej bonaj praktikoj en lingvinstruado kun intervjuoj kaj rakonto de la diversaj fazoj kaj partoj de la projekto. Mi kredas ke tiaj videoj estas gravegaj por nia organizo ĉar ili montras la agadon de TEJO al esperantistoj kaj neesperantistoj kaj bone komunikas la rezultojn kaj la utilon de Erasmus+ projektoj.

**Kunlaboro kun la estraro**

Mia kunlaboro kun la estraro dum 2018 estis tre pozitiva; mi ĉiam ricevis subtenon kaj havis respektajn interagojn. La estraro donis al mi fidon kaj liberecon sekvi miajn komunikajn ideojn, kaj mi aparte aprezas tion.

Dum la jaro mi plej ofte interagis kun la estraranoj Konstanze Schönfeld kaj Charlotte Scherping kaj, kiel jam la antaŭa jaro, nia kunlaboro estis vere fruktodona.

Konstanze ĉiam respekte kaj klare donis al mi taskojn kaj retrokuplojn, mi aprezas ŝian perspektivon kaj kapablon organizi la laboron kun klara konscio pri prioritatoj kaj limdatoj. Tio vere multe helpis mian laboron. Mi aprezis multe ankaŭ la laboron de Charlotte por nia organizo. La pasio, kiun ŝi tute klare havas por nia movado kaj kiu videblas en la videoj kiujn ni faris, inspirigis multajn homojn.

Kaj fine, kvankam ne ĉiuj amas aperi antaŭ kamerao, la estraranoj de TEJO bone konsciis pri la fakto ke labori en serioza, tutmonda organizo postulas ankaŭ esti malferma al aperi en videoj kaj montri publike sian agadon. Mi ĝojas ke oni bone toleris mian insiston dokumenti, foti, filmi kaj raporti.

## Łukasz Żebrowski

*raportas Łukasz Żebrowski, oficisto de TEJO (ekde 2016)*

En la jaro 2018 taskoj, kiujn mi ricevis de la estraro de TEJO iom pli vastis ol tiuj origine planitaj. Krom taskaro ligita al landa agado, temis ankaŭ pri taskoj rilataj al projekto AEJK kaj al ĝenerala helpo al la estraro.

### Landa Agado

Tiukampe fokuso de mia agado estis ĉe Ameriko. Mi partoprenis la 9-an TAKE (TutAmerikan Kongreson de Esperanto) en Havano, Kubo. Tie mi partoprenis interalie Junularan Forumon kaj pritraktis okazigon de la nova amerika-eŭropa projekto de TEJO. Rilatado kun eblaj partneroj de la projekto pri ilia partopreno, okazigataj eventoj, temo de la projekto k.s. daŭris ankaŭ postkongrese. Krom Amerik-rilataj aferoj, mi helpis al Cyprien kaj Ariel pri konkurso por Landaj Sekcioj kaj faris aliajn etajn taskojn.

### Projekto AEJK (Afrika-Eŭropa Junulara Kapabligo)

Je fino de la projekto mi kunorganizis ties ferman renkontiĝon okazintan dum JES en Pollando. Miaj taskoj rilatis ĉefe al prizorgado de partoprenantoj el Afriko. Mi okupiĝis pri invitleteroj, rilatoj kun ambasadejoj kaj konsulejoj, kolektado de ĉiuj dokumentoj, aranĝado de biletrezervoj, preparado de instrukcioj, asistado pri vizakirado kaj ankaŭ pri provoj neformale influi la procezon. Malgraŭ strebegoj kaj subteno de pluraj homoj, la afero sukcesis kvarone - al JES venis tri partoprenantoj el Burundo al kiuj mi aranĝis vojaĝon ambaŭdirekte. Dum JES mi mem partoprenis AEJK-aĵojn kaj subtenis Burundanojn en ilia partopreno. Postevente mi verkis raporteton pri vizito de Burundanoj por la pola ambasadejo en Nairobi kaj fermis la restantajn aferojn rilatajn al AEJK-evento en JES.

AEJK-rilate mi ankaŭ verkis artikolon por Kontakto pri la vojo por realigi la unuan IJK-n en Afriko.

Je la fino de la projekto mi ĉefe faris aferojn rilatajn al financa kontrolo de AEJK. Temis interalie pri ordigado de dokumentoj kaj pri aranĝado kun kontrolfirmao, kiu preparis por ni financkontrolan raporton.

### Aliaj ĝeneralaj taskoj

Krom ĉi-supre menciitaj ĉefaj kampoj de mia agado en 2018, de la estraro mi ricevis aliajn taskojn, kiuj momente estis plej bezonataj. Temis pri helpo pri redaktado de movada rubriko de Kontakto 1/2018, mendado kaj organizado de novaj T-ĉemizoj de TEJO kaj pri unu aparte temporaba tasko - pretigo de ŝanĝendaĵojn kaj ŝanĝindaĵojn en reglamentoj de TEJO, kiuj restis en granda malordo post juraj ŝanĝoj en la organizo.

## Mounir Abjiou

*raportas Mounir Abjiou, subvencipetisto (ekde 2015)*

Mia subvencipetado estis ĉefe tra la programo Erasmus+. Krom la ĉiujaraj subvencioj, 2018 estis kiam la programo Eŭropa Volontula Servo evoluis al la

programo Eŭropaj Solidaraj Korpusoj. La lasta projekto por EVS, kiu estis sukcesa ebligas volontuligi tri volontulojn ekde februaro 2018 kun fenestro de du jaroj dum kiuj ĉiu volontul(in)o rajtas volontuli ĝis unu jaro. La oktobra limdato en 2018 estis kiam mi petis unue trijaran kadron de la ESK-programo, kaj samtempe volontulan projekton de kvar volontuloj ekde la unua de januaro 2019 kun fenestro de 18 monatoj por volontuladoj de unu jaro por ĉiu volontul(in)o. Ambaŭ petoj estis sukcesaj.

Je la fino de januaro 2018, mi ankaŭ fintraktis akreditigpetojn por kvar volontulejoj ekster Roterdamo tra la EVS-programo, por FEL, Herzberg, Sepa k. Asorti, kaj Verĉelo, tamen post vizitoj de la NA por kelkaj el ili, konkretiĝis ke la homaj rimedoj ne estis sufiĉaj por sukcesigi la petojn. FEL tamen ne ricevis viziton de la NA en 2018 - tial estas plano reprovi en 2019 por la nova ESK-programo.

Paralele, kiel ĉiujare, mi raportis pri la administra subvencio de 2017, kies raporto estis sukcesa kaj ni ricevis la ĝojigan novaĵon de la sukceso de la trijara kadro de la administra subvencio ekde 2018, ni daŭre atendas novaĵon pri la subvencio de la jaro 2019 kies subvencipeton mi prizorgis por la decembra limdato de 2018.

Marte 2018, mi malsukcesis forsendi la subvencipeton pri la kunlabora projekto inter Eŭropo kaj Ameriko, tamen mi sukcesis forsendi la projekton en januaro 2019 kaj ni ne ankoraŭ havas novaĵon pri ĝi. La projekto temis pri daŭripova evoluo kun TEJO kiel kunordiganto kaj SKEJ, PEA, GEJ, BEA, BEL, ELNA, KEL k. KEA kiel partneroj. Aldone estis diversaj raportoj pri EVS kiun mi prizorgis pri la projektoj de Fériel, Roxanne, Paul, Olga, Nicoleta k. Valia. La volontul(in)oj kiuj petis la atestilojn Youthpass ankaŭ ricevis ilin post kuna kreado. Aliaj etaj taskoj estis alŝuti post traduki diversajn dokumentojn al Erasmus+ portalo kaj efektivigi diversajn KvK-ŝanĝojn pri forigo, registrigo kaj subskribrajtigo de diversaj estraranoj. Aliaj provoj por subvencikadroj sensukcesaj ekster la Erasmus+ programo estis la Eŭropa Junulara Fonduso kaj projekto en la Visegrad+ fonduso kun SKEJ.

## Quentin Weber-Seban

*raportas Quentin Weber-Seban, KER-oficisto (ekde 2017)*

La salajrita posteno de KER-oficisto estis kreita pasintjare por dediĉi pli da tempo al la eksteraj rilatoj de TEJO kaj pliprofesiigi la laboron ĉi-teme. La Komisiono pri Eksteraj Rilatoj, a**ŭ** KER, multe aktivas de pluraj jaroj, sed tiu aktiveco ĝis tiam estis nur volontula, kun problemoj rilataj al la nereguleco kaj netravidebleco de la aktivulaj disponebloj aŭ la manko je pludono de informoj kaj konsiloj, kiam iu aktivulo devis ĉesi aktiviĝi.

Tiu posteno do ebligas longperspektivan laboron. Mi jam povis alporti mian sperton KER-rilate, kiel eksa aktivulo en ĝi - inter alie reprezentante TEJO-n en la Forumo de Junularo Eŭropa (FoJE) - kaj eksa volontulo de TEJO. Celo ankaŭ estis krei ilojn, kiuj ebligus tiun pli longan perspektivon, ekzemple, recenzilon de la aktivuloj kaj iliaj aktivaĵoj, gvidlibron, prezentilon de TEJO kaj Esperanto, ktp.

Mia ĉefa aktivado ĉi-jare rilatis al la rilatoj kun internaciaj instancoj, t. e. ĉefe la TEJO-aktivado ene de FoJE kaj la kunorganizado de kaj partopreno al la Eŭropa Junulara Evento 2018 (EJO 2018, vidu ĉi-sube). Mi partoprenis al kaj raportis pri la printempa Konsilio de Membroj de FoJE (COMEM), en Bruselo, kaj kunordigis la

TEJO-delegacion por la aŭtuna Ĝenerala Asembleo en Novi Sad. Same mi partoprenis la diskutojn de la interŝanĝgrupo, kiu kunigas samcelajn organizojn ene de FoJE. Mi rete organizis trejnadon de FoJE pri Rajtbaziteco, kiu okazis dum KKPS en Nederlando, kaj kunordigis kaj kunverkis la respondon de TEJO al enketo pri la Celaro por Daŭripova Evoluigo.

Aliflanke, mi ankaŭ partoprenis al la strategia planado de la KER-aktiveco de TEJO. Mi efektive helpis kunverki diversajn dokumentojn de la organizo: la Strategian Planon, la Jarraporton (2017, 2018) kaj politikajn poziciojn. Mi ankaŭ aktualigis la realigplanon. Krom diversaj formalaĵoj kaj administraĵoj, mi ankaŭ plulaboris por pretigi ilojn, kiuj plifaciligus la KER-laboron: aktualigo de la KER-trejnado, verkado de klarigdokumento pri KER kaj de anglalingva prezento de Esperanto, ktp. Tamen, pro tempaj kialoj, mi ne povis tiom pluiri, kiom mi ŝatintus.

## Volontuloj

*raportas Charlotte Scherping Larsson, Ĝenerala Sekretario (2018) kaj Konstanze Schönfeld, Ĝenerala Sekretario (2018-2019)*

*mankas raporto de Olga Sevcenco, respondeca estrarano (2018-2019)*

Resume, dum 2018 volontulis en TEJO kadre de rekompensita programo:

- Fériel Djenidi (Francio) - ekde februaro 2017 ĝis februaro 2018.
- Gilbert Niyukuri (Burundo) - ekde aŭgusto 2017 ĝis aŭgusto 2018.
- Olga Sevcenco (Moldavio) - ekde septembro 2017 ĝis aŭgusto 2018.
- Paul Helly (Francio) - ekde oktobro 2017 ĝis septembro 2018.
- Valia Tamvaki (Grekio) - ekde oktobro 2017 ĝis septembro 2018.
- Clément Baleyte (Francio), ekde oktobro 2018.
- Mia Nordentoft (Danio), ekde novembro 2018.
- Manuela Burghelea (Rumanio/Francio), ekde novembro 2018.

### Loĝado kaj laborloko

Ĉiuj eŭropdevenaj volontuloj deĵoris en la Centra Oficejo (CO) en Roterdamo kadre de la Eŭropa Volontula Servo, programo pagita de la Eŭropa Komisiono. Ili ĉiuj loĝis aŭ en VolDom de UEA aŭ en TEJO-domo, kun kelkaj translokiĝoj inter la du apartamentoj. En la fino de la jaro 2018 la loĝloka situacio stabiliĝis, ĉar ĉiuj volontuloj de TEJO ekhavis ĉambron en VolDom, pli proksime al la Centra Oficejo, kie ankaŭ Olga, la estrarano respondeca pri volontuloj, daŭre loĝas.

Alikontinente, Gilbert volontulis en la Esperanto-Centro de Rumonge, Burundo.

### Alvoko kaj elektoj

Publikigo de alvoko por novaj volontuloj por la eŭropa akademia jaro 2018-2019 okazis dum la fino de februaro 2018. Mia Nordentoft estis elektita en printempo kiel unua volontulo, kun alveno en novembro 2018.

Dosieroj de multaj interesitoj, esperantistoj kaj ne-esperantistoj, alvenis dum la somero. Intervjuoj okazis ĉefe aŭtune, komence de la nova estrara periodo. Clément Baleyte estis elektita kiel dua volontulo por sama periodo, kun alveno en oktobro 2018. Manuela Burghelea kandidatiĝis al la volontula programo kaj estis elektita kiel tria volontulo tuj poste, kun komenco en novembro 2018.

### Mentoroj

Dum la unua duono de 2018, Agata Cichocka rolis kiel mentoro por la EVS-volontulo Valia Tamvaki, kaj Rogier Huurman por la EVS-volontulo Paul Helly.

En aŭtuno, Veronika Mihaldova, juna aktivulo el Slovakio/Ĉeĥio, translokiĝis al Roterdamo kaj akceptis mentori la volontulojn kiam bezonate. Ŝi estis elektita kiel mentoro por la volontuloj ĉar ŝi studas rekte en la Erasmus Universitato en Roterdamo, estas ofte en kontakto kun diversaj lokuloj (ĉefe studentoj) kaj ekde septembro subluis ĉambron en la TEJO-domo.

Ŝia tasko estis provizi lokan *praktikan* subtenon, ekzemple pere de akompanado dum aĉetado de necesaĵoj post alveno de la volontuloj al Roterdamo aŭ bonveniga ĉiĉeronado de la volontuloj en la urbocentro. Kvankam komence okazis miskomprenoj ĉe parto de la volontularo pri kio estas ekzakte la tasko de mentoro, fine de la jaro ĉio klariĝis. Evidentiĝis tamen, ke fojfoje volontuloj dezirus pli da subteno en kampoj kiel en serĉado de laboro aŭ aliaj oportunoj en Nederlando post la EVS-jaro, kvankam provizo de tia subteno entute ne estas la antaŭvidita celo de la EVS-programo.

### Fériel Djenidi

Pro planado de ferioj, la volontulado de Fériel finis en 2018 kun feritempo.

### Gilbert Niyukuri

*raportas Gilbert Nyukuri, volontulo de TEJO en Burundo (2017-2018)*

Mia nomo estas NYUKURI Gilbert, volontulo de TEJO el Burundo (de Aŭgusto 2017 ĝis Aŭgusto 2018). Mia agado kiel volontulo estis grandparte tradukado de la multlingva retpaĝaro *Lernu!*. Temas pri la retpaĝaro kiu ebligas al Esperanto-lernantoj lerni en diversaj lingvoj (kompreneble en la jam tradukitaj lingvoj). Mi tradukis la paĝaron al du lingvoj: la svahila lingvo kaj la runda lingvo, ambaŭ lingvoj estas gepatraj por mi. Do nun svahilaj kaj rundaj parolantoj povas facile lerni Esperanton pere de *Lernu!*.

Kunlabore kun Paul, ni redaktis TEJO Aktuale ĉiumonate. Mi provis kolekti fotojn de TEJO-aktivuloj, kiuj mankas kontaktante la aktivulojn rete sed nur unu, el la kontaktitaj aktivuloj, reagis kaj donis al mi sian foton.

Legu intervjuon kun Gilbert.

### Paul Helly

*raportas Konstanze Schönfeld, Ĝenerala Sekretario (2018-2019)*

Pro manko de memstara raportado de Paul pri volontulado en CO, eblas nur raporti pri la multnombraj kontribuoj de Paul al la TEJO-retejo, al la prezervado de la serviloj de la organizo, al la voĉlegado de publikigendaj tekstoj en kunlaboro kun aliaj CO-oficistoj kaj al la vartado de ĉiuj oficejaj iloj. Paul ankaŭ ĉeestis IJK.

Paul multon agadis por subteni la laboron de la estraro, ĉefe kiam necesis pritrakti teĥnikaĵojn kaj komputilaĵojn, kaj sukcese finis sian volontuladon dum septembro 2018.

## Olga Sevcenco

*raportas Olga Sevcenco, volontulo de TEJO en la CO (2017-2018); tekstigo de Konstanze Schönfeld, Ĝenerala Sekretario (2018-2019)*

Kiel volontulo, Olga celis kontribui al la aktiva partopreno de la esperanta junularo en la socia vivo, fortigante la junularajn asociajn strukturojn de la organizo. Dum la jaro, ŝi efektivigis informajn, edukajn kaj lobiajn programojn kaj agadojn nome de TEJO.

TEJOn ŝi ĉefe reprezentis ene de junularaj asociaj strukturoj. Plie, ŝi rilatiĝis kun ŝtataj institucioj kaj internaciaj organizoj, interalie kontribuante al la Universala Perioda Revuo dum 2017 kaj 2018 (por Slovakio). Dum la jaro, ŝi ofte agis kiel oficiala interkorespondo kun la Unuiĝintaj Nacioj, la Konsilio de Eŭropo, la Eŭropa Junulara Forumo kaj ĝiaj membraj organizoj.

Olga ankaŭ partoprenis al la ellaboro de nova strategio de TEJO por 2018-2020 kaj al la nova laborplano por 2018-2019 kaj 2019-2020.

## Vasiliki Tamvaki

*raportas Valia Tamvaki, volontulo de TEJO en la CO (2017-2018); tekstigo de Charlotte Scherping Larsson, Ĝenerala Sekretario (2018) kaj Konstanze Schönfeld, Ĝenerala Sekretario (2018-2019)*

Valia subtenis en la laboro pri la AEJK-projekto, inter alie pri burokrataĵoj. Ŝi zorgis pri la UNITED-kampanio kaj eventoj kaj agadoj rilate al tio en Roterdamo.

Por la UNITED-kampanjo ŝi prizorgis tradukaĵojn el la tuta mondo, kaj tiel ebligis disvastigon de la kampanjo en multe pli da lingvoj ol kutime. En majo ŝi iris al Budapeŝto por UNITED-konferenco, por plifortigi niajn rilatojn kun la reto.

Dum la jaro ŝi partoprenis en kelkaj KER-eventoj en la beneluksa regiono. Ŝi, kune kun volontulo de UEA, Nicoleta, prizorgis artan aktivaĵon dum EYE-YO!Fest 2018, kiu reprezentis aktivistajn minoritatojn kaj virinojn en Eŭropo kaj Esperanto. En Roterdamo ŝi organizis eventon pri lingva justeco kune kun AEGEE kaj tiel plifortigis niajn rilatojn kun AEGEE kaj videbligis TEJOn en universitata medio.

Valia ankaŭ prizorgis kelkajn tradukojn al la greka kaj la angla ĉe TEJO.org. Ŝi zorgis cetere pri la Duolingo-pakaĵoj, la ĵurnaloj kiujn TEJO sendas al finantoj de la Duolingo-kurso. Krom tio, ŝi zorgis pri burokrataĵoj surloke en la Centra Oficejo kaj pri la retpoŝtskatolo de TEJO.

## Clément Baleyte

*raportas Clément Baleyte, volontulo de TEJO en la CO (2018-2019)*

Dum bela aŭtuna tago komenciĝis mia volontulado ĉe TEJO, kiam la somera dolĉeco ankoraŭ karesas niajn vangojn sed la noktoj jam memorigas nin pri vintro. Mi ĵus malkovris Roterdamon, modernan juvelujon, kie nekunigeblaj mondoj tamen vivas en harmonio. Ne estas strange ĉi tie, vidi kunvivadon de vegetala mirindaĵo kun blanka betono, nek observi novajn kreaĵojn kun malnovaj konstruaĵoj.

Mi memoras tiujn unuajn momentojn, ĉi tiun bruon de la granda enireja pordo de la oficejo, kiu grincas je ĉiu malfermo. En ĉi tiu konstruaĵo ŝvebis speciala odoro. Papero, varmo de fotokopiilo, skribiloj kaj nigraj markiloj. Dolĉa fumo de kafo venanta de la subetaĝo. Post mallonga vizito de la lokoj, nun mi estis en ĉi tiu eleganta ĉambro, je la pinto de ĉi tiuj oranĝaj brikoj. Tie mi pasigos multe da tempo.

Miajn unuajn tagojn dediĉis mi al legado, lernado kaj komprenado de la funkciadoj, celoj kaj projektoj pri kiuj mi fokusiĝos dum la jaro. Rapide venis la unuaj gravaj taskoj. Unue, mi devis ludi la rolon de loĝejagento por la organizo kaj iris serĉi la idealan luanton. Iuj malfacilaĵoj poste kaj multaj kilometroj, la kazo estis fermita. Mi malkovris tiam, ke multajn horojn mi dedicôs al burokrata laboro. Ne ĉiam la plej pasiiga aŭ rekompencanta, sed ĉio devas esti farita kun rideto. Pritrakti retpoŝtojn, respondi, ordigi, enarĥivigi, miaj fingroj estas unu kun tiu ĉi klavaro preskaŭ silenta. Nur etaj klakoj eskapas de la batalo inter mia haŭto kaj ĉi tiuj blankaj literoj. Foje oni nur aŭdas grafiton grati numerojn sur folio, kie oni povas vidi makulon de kafo, signo de mia mallerteco.

La retejo ankaŭ fariĝis dua hejmo. Inter tradukoj, plibonigoj kaj ĝisdatigoj, mi devas atenti pri la plej malgranda eraro. Lingvoj estas aldonitaj, novaj paĝoj tradukitaj en mia kara gepatra lingvo. Sed ĉi tiu domo estas vasta, tiel vasta kiel siaj laboradoj, kaj multaj horoj necesos ĝis la lasta litero.

Blinde, ĉar mi neniam havis la ŝancon nek la kuraĝon, mi eksperimentis la procezon de verkado de la tre timinda dokumento pri la privatecpolitiko, por la nova centra reto de nia organizo. Kelkaj gutoj de ŝvito, du gramoj da leĝaj tekstoj, kaj du nuboj de memfido sufiĉis por plenumi tiujn perfidan projekton. Tiam por malstreĉi la grizan materion, iom da manlaboro bonas foje kontraŭ tiaj monotonaj tagoj. Ni kuspu la manikojn, restu paciencaj kaj paku kelkajn centojn de revuoj, aŭ skribu al tiuj kuraĝaj kaj fidelaj subtenantoj.

Mi havis la ŝancon partopreni diversajn eventojn, kaj rilate al la organizo kaj kadre de la eŭropa volontulado. Ekstere de ĉi tiuj muroj, de tiuj kutimaj odoroj, mi iĝis la predo de tiu nova nekonata mondo. Kun blovo de freŝa aero en miaj haroj kaj sento de libereco, mi iris semajnfine al la fama nederlanda post-somera renkontiĝo en bukolika kamparo. Kelkaj trinkaĵoj, trejnado kies nomon mi forgesis kaj fritaĵoj kiuj memorigas min pri la marbordo kien mi ŝatis eskapi dum posttagmezo. Renkontiĝo inter EVS-volontuloj kaptis nin for de niaj landoj. Ni interŝanĝis, ni ridis, ni dubis, ni eĉ nin demandis pri nia propra ekzisto. Sed la zorgoj ĉiam forflugas finfine. La pozitivo triumfos super la negativo kaj la larmoj de malfeliĉo sinkos en la maron de ĝojo.

Nun en la malvarma nokto daŭre brilas lumo, tiu de la oficejo, kie mi hodiaŭ restas iom pli longe. Morgaŭ mi revenos kelkajn tagojn ĉe mia familio por konkludi ĉi tiun jaron 2018. Ĝis januaro 2019! Mi malŝaltas la lumon kaj pensas senvole pri la venontaj ok monatoj de tiu nova jaro kiu komenciĝos, espereble ĝi enhavos multe da novaj ideoj, novaj projektoj, kaj belaj renkontoj...

## Mia Nordentoft

*raportas Mia Nordentoft, volontulo de TEJO en la CO (2018-2019)*

Mi komencis mian volontuladon en TEJO la 1-an de novembro 2018. Ekde tiam mi zorgas ĉefe pri komputiko kaj la aliaj teĥnikaĵoj de la organizo.

Ĝis la fino de la jaro 2018 mi kadre de tiuj fakoj laboris interalie pri la kreado kaj ellaboro de Centra Reto, nova platformo de TEJO por interna kunlaboro. Fine de la jaro mi povis prezenti pretan novan cirkulersistemon, kiu aŭtomatigas la laboron de ĜenSek.

Same mi zorgis pri la bonfarto de la retaj sistemoj de TEJO kaj ties sekureco, interalie pri la servilo de TEJO kaj ĝia retpoŝtsistemo.

Krome mi partoprenis en KKPS kie mi helpis pri trejnado de FoJE pri rajtbazita aliro. Fine de la jaro mi partoprenis en JES en Germanio kie mi helpis pri la okazigo de kaj protokolado pri la tiea ĉeesta KomitatKunsido.

## Manuela Burghelea

*raportas Manuela Burghelea, volontulo de TEJO en la CO (2018-2019)*

Mi partoprenis KKPS-n en Hunsel inter la 2-a kaj 4-a de novembro kaj kadre de tiu kunveno mi aliĝis al unutaga trejnado pri rajtabazita aliro. Post la kunveno, mi tradukis el la angla en esperanton la materialojn de la trejnisto, por ke ili servu por venontaj trejnadoj de TEJO.

Mi partoprenis trejnadon pri KER en Roterdamo, farita de Francesco Maurelli kaj Michael Boris (nov). Mi partoprenis 5-tagan trejnadon por EVS-volontuloj en Arnhem (nov). Mi partoprenis en internacia seminario en Moskvo pri la aliro de junuloj al rajtoj (25-a - 28-a de novembro), organizata de Konsilio de Eŭropo, kaj raportis pri ĝi en nia retejo.

Mi partoprenis Novjaran Renkontiĝon en Wiesbaden (27-a de decembro - 3-a de januaro), kie mi kontribuis per du programeroj (prelego pri Rumanio kaj enkonduko en la rumanan lingvon) kaj kie mi ankaŭ helpis en la gufujo kaj en la vendado de TEJO-aĵoj.

Mi kunorganizis kunsidojn kun BEJO-anoj por projekto pri Genra Egaleco. Mi (kun)okupiĝis pri la preparado de donacetoj por la TEJO-patronoj. Mi regule kontribuis per tradukoj kaj kunadministrado en Tutmondaj Voĉoj. Mi okupiĝis pri oficejaj taskoj kaj partoprenis plurajn kunsidojn de TEJO. Mi ĝisdatigis laŭpete Trello-tabelon pri cirkuleroj, transdonante el Excel-tabelo al Trello ĉiujn individuajn raportojn kaj informojn de la kuranta monato de mia ekvolontulado (novembro) kaj de kelkaj el la antaŭaj monatoj (aŭgusto, septembro, oktobro). Mi individue alskribis komitatanojn kaj estraranojn por plenumi la cirkulerojn.

## Rilatoj kun UEA

*raportas Francesco Maurelli, 2a Vicprezidanto (2017-2019)*

La jaro 2018 estis aparte intensa en la rilatado kun UEA, kaj kun la Centra Oficejo. Indas tamen apartigi la temaron, interestrara kunlaboro en la diversaj agadkampoj, kaj la funkciado de la administra maŝino, de kiu dependas, ĝuas kaj suferas same UEA kiel TEJO.

La kunlaboro inter la estraroj estis ĝenerale tre profitdona, kun sincera strebo atingi konkretajn rezultojn ambaŭflanke. Aparte menciindas la sukcesa kunlaboro en la fako pri Eksteraj Rilatoj, ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj ĉe Unesko. Tiaj kunlaboradoj estas nepraj, ĉar la ekstera mondo ne konscias pri niaj diversaj asocioj, do gravas doni unuecan mesaĝon. La kunlaboro evoluiĝis ankaŭ en la kapabliga kampo, kaj la kreo de la TEJO-trejnistaro estis inspira por UEA.

Pri kongresoj, kiel TEJO-reprezentanto mi vizitis (proprakoste) Lahti kune kun la delegacio de UEA, cele al la preparoj por la UK 2019.

Plej grava ŝanĝo en UEA en 2018 estis la enposteniĝo de Martin Schäffer kiel Ĝenerala Direktoro. Tio certe havis ankaŭ influon al TEJO-agado kaj TEJO-rilatoj, ĉar multaj decidoj kaj laboroj de oficistoj kaj interkonsentoj inter TEJO kaj UEA dependas ankaŭ de la Ĝenerala Direktoro. La kunlaboro kun Shäffer estis plej ofte fruktodona kaj praktike celorientita. Mi aprezis la strebojn solvi la brulantajn problemojn, kvankam mankis ia strukturita procedo por plani la konstruon, anstataŭ ĉiam kuri por estingi fajrojn.

En 2018 estis reformo de la kotizsistemo en UEA kaj en TEJO. Danke al la proponoj de la TEJO-komitatanoj dum UK 2018, aprobitaj de la plena komitato de UEA,, junaj TEJO-membroj povas ĝui signifan rabaton.

Bedaŭrinda perdo estas la sendo de papera Kontakto al ĉiuj membroj, dum nun ĝin ricevos nur Membro-Abonantoj.

Rilate la oficejon, ni devis alfronti plurajn malfacilaĵojn, kies kaŭzoj estas for de la celo de tiu ĉi raporto. La etoso en la oficejo dum la unuaj monatoj de la jaro estis aparte streĉa, kaj tio - lige kun aliaj kaŭzoj - instigis kontrolviziton de la nederlanda nacia agentejo pri la programo Erasmus+, respondeca pri la volontula programo, sed ankaŭ pri partneraj kaj moviĝprojektoj. Mi sukcesis organizi taŭgan akcepton de la kontrolisto, kaj entrepren(ig)i taŭgajn agadojn, tiel ke TEJO povos sukcese daŭrigi la volontulan programon, kune kun la aliaj programoj mastrumataj de la agentejo. Aparta danko por tio iras al Michael Boris Mandirola, kiu pretis loĝi en Roterdamo dum kelkaj semajnoj en majo, por subteni loke la volontulojn, kaj al Hoan Tran (Ĝojo), kiu deĵoris en la Centra Oficejo dum la somero.

La regularo pri kunlaboro TEJO-UEA bezonas ĝisdatigon, post la enkonduko de la novaj kotizoj kaj en 2018 okazis la unua prilaboro de la necesaj ŝanĝoj, sen tamen atingi maturan tekston por voĉdono far ambaŭ komitatoj.

Plej defia temo rilatas la financojn de TEJO kaj la reciprokaj ŝuldoj TEJO-UEA.. Malgraŭ pluraj provoj, la situacio fine e 2018 ankoraŭ estis for de plena klareco.

Malgraŭ pliboniĝoj kompare al 2017, multo ankoraŭ estas farenda.

# Parto 2: Komisionoj

## Aktivula trejnado

*raportas Léon Kamenicky, vicprezidanto de TEJO (2018-2019)*

Kvankam ne okazis oficiala projekto "Trejnu la Trejniston" dum la jaro 2018, la TEJO-trejnistaro sukcese kontribuis al du projektoj kies celoj estis interalie liveri trejnadsesiojn.

Konkrete, temis pri la Erasmus+ projektoj pri "Volontula Lingvoinstruado" (LI-projekto) kaj pri Genra Egaleco, nomata "Florigu Egalecon inter Junuloj" (FEJ-projekto). La komisiitaro de la TEJO-trejnistaro helpis kun starigo de alvokoj kaj elekto de taŭgaj trejnistoj kaj konzultantoj.

En marto 2018, trejnis el la TEJO-trejnistaro Szabolcz Szilva kaj Przemyslaw Wierzbowski, kunlabore kun Jana Kamenická kaj Christophe Chazarein, dum unusemajna trejnadsesio pri Volontula lingvoinstruado en Tuluzo. La trejnitoj havis okazon daŭrigi sian laboron kun akiro de novaj konoj post la unua "enkonduka" trejnado, kiu okazis dum JES 2017 en Pollando.

En aŭgusto 2018, la plurtaga trejnado de la FEJ-projekto (Florigu Egalecon inter Junuloj) okazis dum IJK. Trejnadojn gvidis Sasha Murr, Stela Besenyei, Querino Neto, Jeremie Sabivumya, Alla Kudryashova. Partoprenis en la trejnado 12 partoprenantoj el Italio, Germanio, Hispanio, Nederlando, Slovakio kaj Britio.

Menciindas, ke malgraŭ tio, ke ni ne forte varbis por ekhavi novajn trejnistojn (ankaŭ pro la fakto, ke en 2017 ni ekhavis ĉirkaŭ 30 trejnistojn el du "Trejnu la Trejniston"-programoj) ni laboris pri memevoluo de la jam ekzistantajn membroj de la TEJO-trejnistaro. Ni okazigis du TEJO Trejnistajn Renkontiĝojn (ToToRo): unu en marto, en Malacky (Slovakio) kaj duan en novembro - pli grandan - en Roterdamo (Nederlando). Celo de ambaŭ renkontiĝoj estis revizii kaj plani agadon, okazigi trejnadsesiojn, provi novajn metodologiojn kaj teamkonstrui. Dum la novembra ToToRo ni aldone komencis labori pri nova "Trejnu la Trejniston"-projekto (kun planoj subvencipeti en 2019) kaj fondis laborgrupon kies celo estas krei "trejnistajn pakaĵojn" por Landaj kaj Fakaj sekcioj de TEJO.

La komitatkunsido de TEJO dum IJK 2018 estis tre grava momento por la TEJO-trejnistaro, kiam la komitato post kelkaj modifoj unuvoĉe akceptis novan reglamenton pri ĝia funkciado kaj tiel montris sian subtenon al la agado de la komisiono.

Sesioj kiuj estis organizitaj de membroj de la TEJO-trejnistaro estis liveritaj (krom tiuj kiuj jam estis menciitaj) ekzemple dum KAEST (Slovakio), SES 2018 (Slovakio), JES 2017/18 (Pollando), JES 2018/2019 (Germanio) kaj IJF 2018 (Italio). Aldone, ekster la Eŭropa kontinento okazis trejnadoj gviditaj de membroj de la TEJO Trejnistaro en kelkaj afrikaj landoj, kiel ekzemple en Benino kaj Togolando.

Laste, la agadon de la TEJO Trejnistaro gvidis en 2018 Charlotte Scherping Larsson (unue kiel TEJO estrarano, poste kiel komisiito), Léon Kamenický (unue kiel komisiito, poste kiel TEJO estrarano), Karina Makosa (vickomisiito) kaj Tomáš Stano (vickomisiito).

## Kongresoj

### IJK 2018

*raportas Carlos Pesquera Alonso, kunordiganto de la IJK 2018, kaj Léon Kamenicky, respondeca estrarano (2018-2019)*

La 74a Internacia Junulara Kongreso de TEJO okazis en la urbo Badaĥozo (Hispanio), ĉe la landlimo kun Portugalio, de la 4-a ĝis la 11-a de aŭgusto 2018. Kunorganizas la Hispana Esperantista Junulara Societo (HEJS) kaj la Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ). La temo de la IJK estas "Genro kaj egaleco".

La IJK estis la dua plej granda evento en la Esperanta movado en 2017. Kompare kun aliaj IJKoj, a IJK 2011 en Kievo estis la lasta kiu atingis allogi pli ol 300 homojn al nia evento ĝis 2018 kun 306, kvankam fakte nur 273 partoprenis el 5 kontinentoj.

Entute 145 programeroj estis organizitaj, inter ili 3 ekskursoj, 4 koncertoj, 1 klaŭna solidara spektaklo kaj publika evento en urba placo. Ni atingis aperi en almenaŭ 14 esperantistaj podkastoj kaj artikoloj, 15 gazetaj, ĵurnalaj kaj gazetaj artikoloj kaj en 5 radiaj programoj (kelkaj el ili estas la plej amasaj en Hispanio). La LKK listigis ĉiujn aperojn en amaskomunikiloj.

Dum la IJK okazis ankaŭ trejnado kadre de la Erasmus+ projekto Florigu Egalecon inter Junuloj (FEJ) rilate al la temo de la IJK. Ĉiu asocio partoprenanta en la programo sendis du personojn kiuj dum semajno partoprenis en diversaj programeroj, Inter ili du kiuj inkludis asociojn lokajn kiuj laboras pri egaleco kaj politikaj partioj.

La organizado suferis la malaperon de pluraj el la LKKanoj, sed la aniĝo al la LKK de Paulina, membro de la LKK de la IJK 2019 helpis kaj faciligis la transdonon de informo. Ankaŭ la strukturigado per kadraj dokumentoj helpis la organizadon kaj la informadon al la TEJO estraro. La organizado estis distanca; T/tri vizitoj okazis: la unua por viziti ejojn, la dua por subskribi kontrakton, kontakti lokajn asociojn kaj kontroli ekskursajn eblojn kaj la tria antaŭ la komenco de la kongreso por finorganizi. La organizado fokusiĝis je esti plej publika eble. La LKK konsideris ke pro la etoso de la IJK, por la partoprenantoj feliĉas kun malmulte kaj tial indas profiti la eventon por varbi pri Esperanto.

### JES 2018/2019

*raportas Konstanze Schönfeld, Ĝenerala Sekretario (2018-2019)*

Unu tagon antaŭ JES 2018 komencis la unua ĉeesta Estrarkunsido de la Estraro 2018-2019. La Estraro kunsidis vendrede, sabate kaj dimanĉe, de la 28-a ĝis la 30-a de decembro 2018. Partoprenis Mia kiel volontulo, Léon, Arturo, Francesco, Olga, Feliĉa, Hanso kaj parttempe Konstanze kiel estraranoj.

Samtempe, oni okazigis trisesian Komitatkunsidon sabate, dimanĉe kaj lunde, de la 29-a ĝis la 31-a de decembro 2018, planante entute 7-horan plensesitempon, kiu estis fine kelkfoje plilongigita. Protokolo disponeblas publike.

Dum JES, okazis komence de 2019 TEJO-trejnado pri rajtbazita aliro gvidata de Michael Boris Mandirola (planita en 2018); komitataj laborgrupoj pri regularo pri Intereskonflikto kaj Voĉdonsistemo; "TEJO sinprezentas" gvidata de Mia Nordentoft kaj malferma horo de la Estraro, al kiu partoprenis ĉirkaŭ 10 eksterestraraj aktivuloj. Oni ankaŭ anoncis la rezultojn de la konkurso por gastigi IJK 2020, lanĉita en oktobro 2018, kiu okazos en Someren, Nederlando.

Plie, okazis la fina renkontiĝo de la projekto Erasmus+ pri Genra Egaleco (FEJ), al kiu TEJO sendis kiel delegitojn Charlotte kaj Marc.

Flanke de la estraro, la kunlaboro kun la LKK de JES 2018/2019 estis tre agrabla, kaj ni kore dankas la organizantojn por la eblo gastigi nin unu tagon pli frue por estrarkunsidi kaj por ricevado de la ĉefa salono por la Komitatkunsido. Interkonsente kun PEJ, la gastiga organizo de venontjara JES, estos deciditaj datoj kaj horaroj de la Komitatkunsido dum JES 2019-2020 dum la unua duono de 2019.

## Partoprenu IJKn 2018

*raportas Charlotte Scherping Larsson, Ĝenerala Sekretario (2018)*

Danke al la monsubteno de la fonduso Partoprenu IJKn 2018 partoprenis en la kongreso Karina Oliveira kaj Hans Becklin, kiuj dum la evento organizis diversajn programerojn, interalie zorgante ankaŭ pri la okazigo de la KER-ekzamenoj de Esperanto. Ambaŭ daŭrigis post la IJK sian agadon ene de TEJO kaj kune decidis zorgi pri la Komisiono pri Edukado.

Por la konkurso, TEJO disponigis ĉi jare 2000 eŭrojn.

## Preparlaboroj por IJK 2019

*raportas Léon Kamenický, Kunordiganto de IJK 2019, Vicprezidanto de TEJO (2018-2019)*

La Loka Kongresa Komitato (LKK), tuj post la anonco de la rezultoj pri kiu ricevos la taskon gastigi la 75an IJKn, pretigis kontraktojn kun la studenthejmoj en kiuj la kongreso kaj programo okazos. Post kelkaj amendoj la kontraktoj estis subskribitaj jam antaŭ la IJK 2018, kio ebligis al la organizantoj publikigi la aliĝilon kaj prezojn jam unu jaron antaŭ la okazigo de la evento.

La unua oficiala LKK-kunsido, kiun partoprenis 6 organizontoj, okazis komence de decembro en Malacky, Slovakio. Dum ĝi oni traktis la programon, planis la budĝeton, interkonsentis pri merkatika strategio kaj identigis la urĝajn taskojn.

Fine de la jaro, la konfirmita LKK konsistis el: Žeňa Belková (administrado), Tomáš Stano (financoj), Paulína Jalakšová (programo), Jana Kamenická (ekskursoj), Manuela Ronco (tema programo kaj atentema kunestado), Vít Guglielmo Mišurec

(vizoj), Veronika Venislovas (akceptejo kaj manĝoj), Matthieu Desplantes (retejo kaj aliĝilo) kaj Léon Kamenický (kunordiganto).

## Eksteraj rilatoj

*raportas Quentin Weber-Seban, KER-oficisto*

La Komisiono por Eksteraj Rilatoj, TEJO-KER, estas tre aktiva komisiono, kaj tio daŭrigis dum la jaro. Krom la aktivuloj kaj volontuloj, unu oficisto kunordigis la laboron de la komisiono. Nia aktiveco en diversaj platformoj ebligas nin defendi lingvajn rajtojn kaj pruvi, ke la lingvo Esperanto estas solvo de internaciaj komunikaddefioj.

La "KER-agado" de TEJO enhavas plurajn partojn, laŭ la agadkampoj de nia organizo. TEJO aktivas ĉefe en FoJE (Forumo Junulara Eŭropa), la UN kaj UNESKO, kaj UNITED (Unuiĝintaj por Interkultura Agado) pri kiuj estos apartaj ĉapitroj sub la gvido de la koncernaj respondeculoj. Plie, la jaro estis markita je la okazigo de la 10a Eŭropa Junulara Okazaĵo kaj YO!Fest, kiu okazos en junio 2018 en Strasburgo, Francio. Jam partopreninte plurajn pasintjarajn variantojn, TEJO ĉi-foje ne nur estis parto de la organizo teamo danke al Konstanze Schönfeld (Tuŝka). Ankaŭ estas ĉi sube aparta ĉapitro prie.

Krom tiuj gravaj laboreroj, la Komisiono por Eksteraj Rilatoj ankaŭ verkis aŭ aktualigis la politikajn poziciojn de TEJO.

## UNITED

*raportas Klára Ertl, komisiito pri UNITED*

Komence de la jaro, TEJO-anoj kaj aliaj Esperantistoj tre sukcese plurlingvigis la afiŝojn, sloganojn, kaj gazetaran komunikon de UNITED por la Semajno Kontraŭ Rasismo, unu de iliaj gravaj kampanjoj.

Pro manko de subvencioj, bedaŭrinde en 2018 ne okazis konferencoj de UNITED laŭ ilia kutima kvalito kaj strukturo. Okazis malgrandskalaj konferencoj, inter kiuj maja kunveno en Budapeŝto, al kiu TEJO sendis la CO-volontulon Valia.

Dum KER-kunsido post EJO en majo, kaj poste, interesitoj pridiskutis la estontecon de rilatoj kun UNITED. Ekzemple, landaj sekcioj de TEJO povus laŭregule membriĝi kiel apartaj partneroj de UNITED, kio signifus pli grandan videblecon de Esperantistoj ĉe la konferencoj. Eblas ankaŭ individue aliĝi al la ĝenerala delegitaro de UNITED, por aktivi en iliaj propraj eksteraj rilatoj. Fine de la jaro tion faris Konstanze kaj Paulína.

Longdaŭre, eble TEJO-ano povus kunorganizi UNITED-konferencon. Por tio necesas enhava sperto pri la koncerna temo kaj tre longdaŭra engaĝiĝo de TEJO kiel aktiva partnero.

Mi daŭre volontuladis ĉe UNITED laborante pri la Mortolisto, kiu ekhavis pli kaj pli da amaskomunikila atento. Mi skribis pri ĝi ĉefartikolon en numero de Kontakto.

Fine de la jaro mi akceptiĝis kiel membro de la Kampanj-Kunordiga Teameto de UNITED (CPG) por 2019. Tio signifas ke mi kunordigas la kampanjojn de UNITED dum la tuta jaro, kune kun 3 aliaj junuloj el aliaj partneraj organizoj. Ni renkontiĝis decembre en Budapeŝto por prepariĝi al niaj taskoj.

## UN & Unesko

*raportas Rakoen Maertens, komisiito pri KER-agado ĉe UN kaj UNESKO*

Januare 2018, Ekosok Junulara Forumo (Novjorko, Usono). Partoprenis Francesco Maurelli kaj Rakoen Maertens. Ni havis gvidan rolon en kunsidoj de IKRJO. Pro nia partnereco, ni dum la ĉefaj sesioj ricevis sidlokon tute antaŭe en la granda salono en UN kun la nomo 'TEJO' sur ĝi, klare videbla por la partoprenantoj. Ni starigis la unuajn kontaktojn por ebla kunlaboro dum la Alt-Nivela Politika Forumo pri Daŭripova Evoluigo (ANPF).

Julie 2018, por la unua fojo en la historio de TEJO, delegito de TEJO (Rakoen Maertens) partoprenis en la ANPF, la ĉefa evento pri la Celoj por Daŭripova Evoluigo (Novjorko, Usono). Nova grava atingo estas la kunorganizado de evento pri cirkla ekonomiko kune kun la oficiala Belga Misio al UN, kiu estas la unua evento de TEJO rekte kun landa delegacio ĉe UN. Ĝi estis granda sukceso kun alt-nivelaj partoprenantoj, kaj altigis nian pozicion ĉe UN.

Novembre 2018, Unesko NRO Forumo pri Scienco (Moskvo, Rusio). Partoprenis Rakoen Maertens. Ni aktive diskutis pri la rolo de lingvo por la scienca mondo, kaj la neceso de diverseco en kulturo kaj opinioj por bona scienco. Ni ankaŭ montris studojn en kiu ni uzas Esperanton kiel ilon por plurkultura esploro, kiuj estis bone aprezitaj.

Decembre 2018, ni partoprenis en kunveno de IKRJO (Cascais, Portugalio), kaj gvidis kelkajn sesiojn. Ni poste partoprenis en Unesko Ĝenerala Konferenco (Parizo, Francio), kie ni lobiis por elektado de TEJO partnero Richard Apeh por la Unesko NRO Liga Komitato. Richard ne estis elektita kiel prezidanto, sed havis sufiĉe multe da voĉdonoj por daŭrigi sian mandaton kiel membro de la Liga Komitato.

## UNOY

*raportas Ana Ribeiro, Komisiito pri UNOY (ekde 2018)*

UNOY Peacebuilders (Akronimo por "United Netowork of Young Peacebuilders" aŭ "Unuiĝinta Reto de Junaj Packonstruantoj" en esperanto) estas reto de junularaj organizoj kiuj laboras pri paco, ĝia ĉefa celo estas lobiumado kaj kampajnado pri paco kaj kapabligo de junuloj pri temoj rilataj al packonstruado. Krom tio, UNOY konektas pli ol 80 membraj organizoj tra la mondo, inter kiuj estas TEJO ekde ĉi-jara Aprilo, sed la laboro kun la reto komenciĝis antaŭ kelkaj jaroj: la unua mencio pri ebla membriĝo en UNOY estis farita en retlisto de TEJO en 2015, kaj Fernando Maia, Veronika Poor kaj Sasha Murr jam havis kontakton kun la reto antaŭe.  La kandidatiĝo por membriĝi en UNOY estis skribita de mi en Februaro de 2017, kaj en Februaro de 2018 mi kune kun Rakoen Maertens estis intervjuataj kiel reprezentantoj de TEJO de iu teamano de UNOY, kaj fine en Aprilo ni ricevis la rezultojn pri la akcepto de nia kandidatiĝo. Krome, indas mencii ke ne estas membreckotizo por UNOY, do TEJO ne devas pagi por esti parto de la reto.

La unua aktivaĵo ĉe la reto estis la balotoj por novaj membroj de "International Steering Group" kiu estas speco de Estraro de UNOY. Kiel membro, TEJO havis unun voĉon. Klára Ertl intervjuis la kandidatojn kaj skribis raporton pri ili al listo de

TEJO-KER, ni fine elektis per diskutado tie la kandidaton, kiu ŝajnis havi pli grandan intereson pri esperanto. La balotoj okazis en junio kaj la kampajno en majo sed bedaŭrinde la kandidato kiun ni decidis subteni ne estis elektita.

En junio ankaŭ kelkaj TEJO-anoj partoprenis eventon organizitan de UNOY por anonci novan konkurson pri filmoj, al kiu TEJO ĉi jare bedaŭrinde ne havis tempon por partopreni (inter alie ĉar la limdato por partopreni estis tre proksima de IJK) sed estas pripensinda afero por ontaj jaroj.

En Septembro, Tyron Surmon partoprenis en la ĉefa evento de UNOY, kiu estas la "Young Peacebuilders Forum", kiu okazis en Hago. Indas mencii ke li ricevis stipendion de la reto por partopreni je la forumo. Tyron skribis interesan raporton pri la evento kiu povas esti legata ĉi tie.

En novembro Konstanze Schönfeld partoprenis en Lisbona Forumo, unu el la ĉefaj eventoj de Eŭropa Konsilio, kun financa subteno de la reto.

En Decembro, TEJO povis indiki partoprenanton por trejnado en Kartvelio pri konstruado de paco en junularaj organizoj, sed bedaŭrinde la trejnanto devis loĝi en Nederlando (ĉar la sidejo de TEJO kaj UNOY estas en tiu lando) kaj devis memsubteni 30% de la kostoj de la trejnado kaj tio limigis nian elekteblon, mi strebis kune kun NEJ trovi iun kiu povus partopreni sed bedaŭrinde mi ne trovis.

Mi resumus la unuan jaron de TEJO ĉe UNOY kiel tre fruktdona jaro por TEJO ĉar kelkaj el niaj aktivuloj povis spertiĝi kaj partopreni en eventoj. Ankaŭ estis lernjaro, ĉar ni ne havis vastan sperton kun la reto antaŭe. Je la ontaj jaroj, mi esperas ke la agado kaj influo de TEJO je la reto povos kreskigi, sed inter alie ni bezonas pliajn aktivulojn.

## Forumo Junulara Eŭropa

*raportas Paulína Jalakšová, delegito de TEJO ĉe FoJE (ekde 2018)*

Delegitoj de TEJO partoprenis la du ĉefajn asembleojn de FoJE dum la jaro: COMEM (renkontiĝo de la KOmitato de la MEMbroj) kaj ĜA, la Ĝeneralan Asembleon de FoJE, kiu okazas ĉiujn du jarojn kun la celo renovigi la gvidantaron de la Forumo.

COMEM okazis en aprilo en Bruselo. La oficiala delegito estis Quentin Weber-Seban kaj la dua estis Paulína Jalakšová. Partoprenis ĝin ankaŭ Michael Boris Mandirola kiel prezidanto de CBMA (organo por konsulti kaj doni konsilojn pri kandidatoj por membreco en FoJE). Pluraj politikaj dokumentoj de malsamaj organizoj estis prezentitaj. TEJO prezentis kelkajn kulturlingvajn amendojn al ili kaj ĉiuj estis akceptitaj. Kelkaj helpis finkrei ekzemple ĉi tiun dokumenton.

La Ĝenerala asembleo okazis novembre en Novi Sad (Serbio). Oficialaj delegitoj estis Paulína Jalakšová kaj Francesco Maurelli. TEJO estis reprezentita ankaŭ de Konstanze Schönfeld kiel tria aldona delegito, krome ĉeestis ankaŭ Michael Boris Mandirola kiel prezidanto de CBMA. Bonŝance, tiu ĉi lasta tria loko estis ankaŭ repagita de FoJE, ĉar TEJO venkis en la lotumado por subvenciitaj triaj delegitoj.

Dum ĉi tiu evento okazis balotoj. Paulína Jalakšová kandidatiĝis por FCC (FinancKontrola Komisiono) sed ne sukcesis elektiĝi. TEJO intervjuis kandidatojn por prezidanto antaŭ la evento mem kaj por aliaj postenoj dum la evento kun la

helpo de la Interŝanĝa grupo. TEJO ankaŭ faris prezenton pri kiel lingvoj influas nian pensadon, kiun spektis ĉiuj partoprenantoj. Prezentis ĝin Paulína Jalakšová.

Same kiel dum COMEM, pluraj dokumentoj estis prezentitaj. TEJO prenzentis kulturlingvan amendon al unu el ili kaj ĝi estis akceptita. Temis pri la aldonaĵo de la 8a punkto de la dokumento kiu diras: *"To advocate with Council of Europe Member States to protect and valorise the Jewish cultural heritage as well as the Jewish languages in Europe, such as the Yiddish and the Judaeo-Spanish."* TEJO ankaŭ oficiale subtenis unu el la dokumentoj, kiu same estis akceptita.

Krome, Michael Boris Mandirola estis prezidanto de CBMA (la Konsultorgano pri Membrecaj Aferoj) dum la jaroj 2018 kaj 2019. Tiukadre li partoprenis partoprenis studvizitojn al la Nacia Junulara Konsilio de Ukrainujo, la Nordirlanda Junulara Forumo kaj la Konsilio de la Germanparolanta Junularo en Orientbelgujo.

## YO!Fest kaj EYE 2018

*raportas Konstanze Schönfeld, grupestro kaj kunordiganto de TEJO ĉe YO!Fest kaj EYE 2018, estrarano pri Eksteraj Rilatoj en Eŭropo (2017-2018)*

Al YO!Fest kaj EYE 2018 partoprenis 26-kapa TEJO-delegacio kun partoprenintoj el pli ol 10 landoj. Estis organizitaj entute 6 aktivaĵoj, kiuj atingis centojn da junuloj dum nia dutaga ĉeesto en la evento. 20 partoprenintoj estis rekte subvenciitaj de la Eŭropa Parlamento, la ceteraj estis subvenciitaj de monŝparo el la ricevita subvencio kaj el parto de la KER-buĝeto. Tri ne-eŭropunianoj partoprenis la eventon: unu loĝanta en Rusio, du loĝantaj en Eŭropa Unio (Italio kaj Francio), sed kun rusa kaj moldava civitaneco. 25 partoprenintoj estis sub 35: partoprenis plie Sara Spanò kiel reprezentanto de UEA. Partoprenis kaj novuloj, kaj estraranoj, kaj volontuloj el CO kaj KER-oficisto, kaj kernaj KER-aktivuloj el tuta Eŭropa Unio.

Ankaŭ en 2018, TEJO rolis kiel oficiala partnera organizo. Ni estis bonŝance elektitaj en la unua rondo dum septembro-oktobro 2017 kaj akceptis volontule kunordigi la 6-partneran budejon "Laborantaj por pli forta Eŭropo". Kadre de tiu kunordigo, ni proksime laboris kun organizoj kiel la Junularaj Konsilioj de Nord-Makedonio, Bulgario, Britio, Aŭstrio kaj kun la loka brita organizo Ubele, kun kiu TEJO kunpartigas plurajn valorojn kaj labormetodojn. Plie, ni havis la eblon kunlabori kun la Aŭstria Federacia Kancelario, kiu ne partneriĝis sed rolis kiel gasto, pri organizado de kroma aktivaĵo en nia budejo.

El la 6 organizitaj aktivaĵoj, estis entagorditaj en la budejo mem (1) renovigita rapidkurso de Esperanto dufoje kaj (2) tutnova metiejo pri lingvoj kaj medioj unufoje. Tiel TEJO estis la organizo kun la plej multaj tagorderoj en la tuta budejo. Ekster la budejo oni prezentis la renovigitajn aktivaĵojn (3) "Senpagaj Kuketoj" (kiel dum YO!Fest 2017) kaj (4) "Lingva Kvizo" (kiel dum YO!Fest 2016). Ene de la Parlamentejo, TEJO starigis pli ampleksan (5) diskutmetiejon pri lingva diskriminacio kun la titolo "Lingvoj, tiu endanĝerita specio", al kiu partoprenis preskaŭ 50 junuloj. Kunlabore kun la aliaj budejanoj, la TEJO- kaj UEA-volontuloj en la CO, Valia kaj Nicoleta, kune prezentis (6) muron pri gravaj virinoj en Eŭropo kaj Esperantujo.

Kadre de la tuta evento, estis interalie produktitaj aŭ aĉetitaj novaj pingloj, flugfolioj por la kuketa aktivaĵo (antaŭo kaj malantaŭo) kaj nova Pepo. Kromaj

informoj pri la pretigadoj mem legeblas ĉe la dediĉita retejo; fotoj videblas ĉe publika Gugla Fotaro.

Post la dutaga parlamentumado, preskaŭ ĉiuj partoprenantoj kolektiĝis dimanĉe por strategia kunsido pri KER, al kiu ĉiuj kontribuis por strukturigi la venontajn paŝojn de TEJO-agado ene de la komisiono pri Eksteraj Rilatoj.

Nia ĉeesto en la evento nur eblis danke al la Esperantistoj, kiuj subtenis nin surloke: apartan dankon mi ŝatus sendi al Bruno Flochon, Christian Schott, Quentin, al la posendantino de la AirBNB Christine kaj al la patro de Léon, kiuj ŝoforis, ĉiĉeronis, gastigis, manĝigis kaj intervjuis nin dum EYE 2018.

## Landa Agado

### Afriko

Mankas raporto.

### Azio

Mankas raporto.

### Eŭropo

*raportas Konstanze Schönfeld, Ĝenerala Sekretario (2018-2019)*

Landa agado en Eŭropo dum 2018 estis maltre strukturigita. Tamen, okazis multaj eventoj, trejnadoj, kaj ĝenerale evoluoj ene de la eŭropa Esperanta movado.

UK, IJK kaj ILEI-kongreso 2018 okazis en okcidenta Eŭropo; JES okazis kaj en Pollando kaj en Germanio. Estrarkunsidoj okazis nur en Eŭropo: en Hanovro, en Lisbono/Badaĥozo, en Roterdamo, kaj fine de la jaro dum JES 2018, denove en Germanio. Preskaŭ ĉiuj gravaj junularaj eventoj en Eŭropo gastigis erojn de projektoj Erasmus+, allogante pliajn junulojn pere de subvencioj kaj kapabligaj programeroj. Multaj estraroj de eŭropaj sekcioj estis sukcese renovigitaj.

Daŭre mankas al LA-Eŭropo centra Komisiito. Malgraŭ la provoj kapti interesitojn, la posteno restis vaka dum la tuta daŭro de la jaro.

### Nordameriko

Mankas raporto.

### Oceanio

Mankas raporto.

### Sudameriko

Mankas raporto.

## Merkatiko kaj Informado

*raportas Charlotte Scherping Larsson, provizore respondeca estrarano (2017-2018)*

*mankas raporto de Arturo Crespo, respondeca estrarano (Merkatiko) (2018)*

*mankas raporto de Hoan Tran (Ĝojo), respondeca estrarano (Informado) (2018-2019)*

Dum la Estrarkunsido en Hanovro en somero 2018 estis denove diskuto pri la fakoj de merkatiko kaj informado. Multaj diskutoj okazis pri la valoro de merkatiko, kaj ke pro tio gravas havi informadon kiel disa fako, por ke estu klara kio estas merkatiko kaj kio estas informado. Por merkatiko temas pri la aliro, kion la organizo havu al la ekstera mondo - kiajn komunikkanalojn, kielmaniere komuniki kaj kiaj temoj entute estas taŭgaj por la organizo. Laboro pri tio ne vere okazis de la estraro de 2018/2019 en la kalendara jaro 2018. Por informado gravas ke estu regulaj artikoloj kaj raportoj al la membroj pri la planoj de la estraro kaj la komitato pri la estonteco de la organizo. Tio ne okazis en 2018. Mi volis ke ni publikigu artikolojn pri niaj planoj pri elekta sistemo, pri aliro al trejnadoj kaj kiel ili estas malsamaj al prelegoj, pri kiel la estraro pensas pri Erasmus+projektoj kaj kiel ni vidas ilin kiel maniero plifortigi niajn landajn sekciojn kaj engaĝigi en kerna TEJO-laboro. Nenio el tio okazis, kaj montras ke estas bezonata ne nur bona redaktoro, sed ankaŭ forto kaj sperto en la estraro zorgi pri baza informado. Ĉiu estrarano devas esti konscia pri la neceso, informi pri siaj planoj, kaj la respondeca estrarano devas kunordigi kaj subteni la aliajn en tia laboro. Legu sube pri la laboro de aliaj aktivuloj kaj oficistoj.

## Kontakto

*raportas Rogener Pavinski, redaktoro de Kontakto*

En 2018 la redakta laboro de Kontakto okazis en normala situacio. Kiel daŭrigo de la pasintjara laboro, daŭre la revuo aperas per 6 numeroj jare, kaj feliĉe ĝis nun, presitaj plenkolore en bona kaj kvalita papero. La revuo revuo daŭre havis pli malpli la saman aspekton kaj kutiman enhavon kun kelkaj plibonigoj.

La 6 numeroj aperis sufiĉe akurate, sen grandaj malfruoj. La korektado kaj provlegado ŝuldiĝas al la teknika helpo de la TEJO-voluntuloj kaj al la eks-oficisto Rob Moerbeek. La Movada Rubriko estis prizorgita de Marcionilo Vasconcelos ekde la numero 2018:2. La grafikan prilaboradon faris kiel kutime Romulo Felício. Ni tenis la konstantajn rubrikojn (*Intervjuoj*, *La Blaga Blogo*, *Tiel la Mondo*). Aliaj rubrikoj aperis, sed ne konstante (*Kontaktek*, *Recenzoj*). Kaj aperis nova rubriko, *Videoludoj.*

Pri statistikoj pri membroj UEA havas la nombrojn. Tamen de 4 jaroj ne okazas abono-kampanjo aŭ strategio nek de TEJO kaj UEA por altigi la nombrojn de abonantojn. Laŭ mi nepras tiaj kampanjoj dum la kongresoj kaj fine aŭ komence de la jaroj. Kun la aktuala estrarano pri kulturo kaj kongresoj de UEA, Fernando Maia, ni ekplanas strategiojn por kreskigi la abonantaron, malgraŭ manko de teama laboro. Bonvenas pliaj kunlaborantoj.

En la reto, la *Facebook*-ŝatoj stagnis pro manko de pli profesia kaj aktiva laboro tiukampe: de 1.724 (2017) al 1791; sed la *Twitter*-sekvantoj kreskis de 1679 (2017) al 1804.

**Intervjuoj**

La numeroj en 2018 prezentis la jenajn intervjuojn:

- Ĵomart kaj Nataŝa – 30 jaroj da kunkantado (2018.1)
- *Linguisticae* – La lingva Jutubisto, kiu apogas Esperanton (2018:2)
- Rob Moerbeek – La Provleganto de Esperantujo (2018:3)
- Tim Morley – Tim Morley Kontraŭ Esperantujo (2018:4)
- Brian Russel – Alia Mondo Eblas (2018:5)
- Suso Moinhos – Tra la spegulo de poezio (2018:6)

**Ĉeftartikoloj**

La ĉeftartikoloj klopodis prezenti gravajn kaj akutualajn temojn, kiuj montras la diversecon en la mondo kaj opiniojn, laŭeble per nekutimaj vidpunktoj, kiuj donas la ŝancon al la legantoj ekknoni novajn perspektivojn el aŭtoroj de diversaj landoj.

La ĉefartikoloj en 2018 estis:

- Pluramemo – Novaj Difinoj kaj Defioj en Amrilatoj (2018:1)
- Scienca Scio – La debato pri Homeopatio kaj pri (2018:2)
- Sporto – Ĉu vere socie virta? (2018:3)
- Cifereca Mono – Kiel ĝi utilas al ni? (2018:4)
- Brazilo Brulas - La incendio en Nacia Muzeo kaj en Politika Konflikto (2018:5)
- Rifuĝintoj al Eŭropo kaj la Mortolisto de UNITED (2018:6)

## Movada Rubriko

*raportas Marcionilo Vasconcelos, redaktoro de Movada Rubriko (ekde 2018)*

En marto de 2018 la redaktado de Movada Rubriko ŝanĝiĝis de Massimo Ripani al mi, Marcionilo Vasconcelos. Kiel redaktoro de tiu historia revueto de TEJO, nun parto de Kontakto, mi provis uzi ĝin laŭ nova perspektivo.

Unue mi ekkomencis kontaktante homojn de diversaj TEJO-sekcioj por kunigi ideojn, agadojn kaj defiojn spertitajn de tiuj organizoj. Tion faris mi kun la celo evidentigi sekvindajn agadojn, kaj ankaŭ montri la travivatajn defiojn de kelkaj el ili, cele al interŝanĝo de ideoj kaj eblaj solvoj.

Intervjuoj estis farataj por doni voĉon al homoj kaj spacon al iliaj ideoj, ĉiam celante la divastigadon de bonaj ideoj kaj, kelkfojojn, ŝercante apogon por tiaj ideoj. Al legantoj de la Movada Rubriko en 2018 ankaŭ eblis observi diskutojn de ideo por-movadaj. Krom intervjuoj, la homoj povis tralegi interesajn vidpunktojn pri la movado kaj pri la esperanta lingvo.

Ankaŭ tiu rubriko de la Revuo Kontakto estis uzata por ebligi novaĵojn pri nia organizo, TEJO, kaj eĉ kongresoj kaj eventoj de diversaj mondpartoj. Tio sentigis al la organizantoj de tiaj renkontiĝoj ke iliaj agadoj estas gravaj kaj ke organizo kiel TEJO havas intereson pri ili kaj pri iliaj aktivaĵoj.

Unu el la unuaj raportitaj aferoj temis pri SES en Slovakio, kaj AMO-seminario en Rusio. Tiam, la partopreno kaj junula perspektivo estis prezentita, ĉar ni celis montri ke, kvankam porinstrua kaj lerno de la lingvo, tiuj eventoj abundas je aferoj kiuj allogas junulojn lernemajn kaj eĉ nur ludemajn ankaŭ.

En la dua eldono kun mia redaktado, krom novaĵoj pri TEJO kaj UNOY, estis prezentita teksto pri la diskuto Esperanta movado kaj Scienco. Per tiu teksto ni provis evidentigi kiom grava kaj kiom bunta povas esti la scienco por nia Movado, Kaj fine de la dua eldono oni montris la unuan kunvenon de la Sudorientazia Junularo kaj ties atingojn, krom novaĵoj pri la Esperanta kastelo "Gréssilon". Ambaŭ raportoj montris kiel la junularon strebas antaŭenigi esperantajn aranĝojn por junuloj en siaj regionoj kaj kiel tio riĉigas nian esperantan kulturon. Menciindas ankaŭ ke fine de tiu revuo aperis afiŝo pri Esperanta aranĝo de TEJO-sekcio, BEJO, pri aranĝo okazigita de ĝi fine de la jaro. Per tiuj novaĵoj kaj tekstoj oni povas konstati ke estis celo de Movada Rubriko krei bonan perspektivon pri tio kio enestas kaj estas kreata de junuloj en nia Esperantujo.

La tria eldono kiun mi prizorgis, la unua teksto-paĝo temis pri orfejo kiun junulo el Kongo prizorgas. Krom teksto por ebligo de helpo al tiu institucio, ĝi pritraktas perspektivojn pri tio ke esperantistoj devas esti aktivaj ankaŭ "for de Esperantujo", tiel aperis la flamo por ke junaj idealistoj vidu tiun aktivaĵon, eble helpu ĝin, kaj elĉerpu bonajn aferojn el tiu sperto de Joel Muhire. Novaĵo pri IJK ankaŭ ĉeesti, kun interesa raporto de Antonia Montaro, kies raporto vidigis belan etoson de tiu evento. Fine de ĝi ni havis raporton pri Herzberg, kie okazas trejnado por klerigo de homoj movade kaj lingve, kaj prezenton de la tiama elektita estraro de TEJO.

En la lasta numero de 2018, prizorgita de mi, krom novaĵoj pri interretaj servoj cele al divastigo de Esperantaj Aranĝoj, aperis intervjuo kun la TEJO-sekcio en Pollando okaze de ĝia sesdekjariĝo. Krom aperigi la historion de al asocio, ni suckesis montri defiojn, spertojn pozitivajn kaj sekvindajn agojn de tiu sekcio en la lando. Fine, sed ne malpli grave, Paulínia raportis pri la partopreno de TEJO en FoJe.

Certe, la jaro 2018 estis fruktodona por la revuo Kontakto en la sekcio Movada Rubriko. TEJO-sekcioj, organizantoj de eventoj kaj projektoj sentis sin gravaj havante la eblon travidigi siajn laborojn ene de TEJO-revuo, kaj tio ankaŭ kontribuis al legantoj kiuj kuniĝis kun multaj novaĵoj kaj interŝanĝo de ideoj kiuj certe riĉigas nian vidpunkton pri la movado.

## TEJO-aktuale

TEJO-aktuale redaktis TEJO-volontuloj Paul Helly kaj Gilbert Niyukuri. Post foriro de Paul de la CO, Clément transprenis la taskon post transdono de Ariel, sed TEJO-aktuale ne aperis dum la cetero de 2018. La volontuloj estis okupitaj kun pluraj gravaj taskoj dum la unuaj monatoj de sia mandato kaj oni ne sukcesis prizorgi renovigon kaj dissendon de TEJO-aktuale. Por la estonteco, ni certigu ke volontuloj transdonu al sekvaj volontuloj la informojn pri TEJO-aktuale, ke oni ricevu aliron al la konto en MailChimp kaj informojn pri la dezajno de la bulteno kaj ĝia dissendo, por ke ne plu okazu prokrastojn.

## Projektoj

*raportas Konstanze Schönfeld, respondeca estrarano (2017-2018)*
*mankas raporto de Olga Sevcenco, respondeca estrarano (2018-2019)*

### Kunlaboro kun Kosmo

*raportas Charlotte Scherping Larsson, Ĝenerala Sekretario (2017-2018), Konstanze Schönfeld, Ĝenerala Sekretario (2018-2019) kaj Mounir Abjiou, subvencipetisto*

En 2018, estis prezentitaj subvencipetoj por sekvaj projektoj:

- 1 projekto kadre de KA2 en februaro 2018, kunordigo de TEJO el Nederlando
- 1 projekto kadre de KA2 en aprilo 2018, kunordigo de SKEJ el Slovakio
- 1 projekto kadre de KA1 en aprilo 2018, kunordigo de TEJO el Nederlando

Neniu el ili sukcesis. Ekestis ankaŭ provoj prezenti similan projekton kun kunordigo de PEJ/PEA el Pollando, sed la planado fiaskis pro malfruo de TEJO en prezenti la dokumentojn por subskribi al PEA. Neniu projekto estis prezentita dum la dua duono de 2018.

Nesukceso estis kaŭzita bedaŭrinde de pluraj eksteraj kialoj: la oktobraj KA2-proponoj (verkitaj de Kosmo kaj prezentitaj en 2017) surprize ricevis tre malaltan poentonumeron. Oni klopodis kolekti informojn el la agentejoj, sed komunikado kun ili tre malrapidis. Finfine, oni sukcesis ĝustatempe prezenti similajn projektojn surbaze de la malsukcesintaj antaŭaj por la aprila limdato.

Prezentado de Eŭropa-Amerika Projekto estis planita por marto 2018, sed oni ne sukcesis ĝustatempe liveri ĉiujn dokumentojn kaj prezenti ĝin. Laboro farita utilos por reprezentado dum 2019. La projekto, kiu celas Kapablokonstruadon inter Eŭropo kaj Ameriko, temos pri daŭripova evoluo kun TEJO kiel kunordiganto kaj SKEJ, PEA, GEJ, BEA, BEL, ELNA, KEL k. KEA kiel partneroj. Ĉiu eventorganizanto elektis unu el diversaj prioritatoj de la 2030-a UN agendo pri daŭripova evoluo. La subvencipeto celas proksimume subvencion de 120,000 eŭroj sendante homojn inter ambaŭ kontinentoj.

Dum IJK 2018, kelkaj estraranoj decidis subskribi kontrakton kun Kosmo, pri servoj petitaj de ili por subteni TEJOn. La plano estis, por ĉiu limdato de Erasmus+, subvencipeti por novaj projektoj Erasmus+.

Por ke Kosmo povu bone plani, estis enmetita en la kontrakto ke TEJO devas prezenti projektideon por ĉiu limdato, aŭ ĝusttempe malmendi (30 tagoj antaŭ limdato). En mala okazo, TEJO devas pagi pro la malfruo aŭ manko de komunikado. Inter IJK kaj la fino de 2018 estis unu limdato, la 4-a de oktobro. Neniu subvencipeto estis pretigita kaj Kosmo ne estis sciigita pri tio. Ni devas danki la amikecon de tiu firmao, ĉar ni ne bezonis pagi altan punan sumon.

### Afrika-Eŭropa Junulara Kapabligo (AEJK-projekto)

*raportas Francesco Maurelli, 2a Vicprezidanto (2017-2019)*

## Florigu Egalecon inter Junuloj (FEJ-projekto)

*raportas Charlotte Scherping Larsson, respondeca estrarano ĝis septembro 2018, poste eksterestrara projektrespondeculo de TEJO; kaj Konstanze Schönfeld, eksa volontula projektmastrumistro de FEJ (2017) kaj delegito de TEJO ĉe IJF kaj JES*

FEJ havis sian komencan kunsidon dum oktobra KKPS 2017 en Nederlando. Dum 2018 okazis la aliaj tri transnaciaj projektrenkontiĝoj: dum IJF en Italio en marto; dum KAEST en Slovakio en oktobro kaj la lasta dum JES en Germanio en decembro. La plej grava celo de la projekto estis la plurtaga trejnado dum la IJK 2018 en Hispanio, al kio partoprenis 12 trejnitoj, du de ĉiu partnera organizo.

Dum IJF ni devis ŝanĝi la planojn por trejnistoj dum la trejnado por IJK, kaj ni faris malferman alvokon. Ni faris cerboŝturmadon pri la projektaj celoj kaj diskutis kion ni ankoraŭ ŝatus atingi kadre de la projekto. Ni havis multe da belaj ideoj, kelkaj el kiuj ni sukcesis realigi, kelkaj kiaj esepereble estos realigitaj dum 2019. Severin faris trejnadon pri transakcia analizo, Charlotte Scherping Larsson gvidis sesion pri 4R, metodo por analizi egalecon en organizoj. Uzu ĝin ankaŭ en viaj organizoj kaj projektoj: legu la prezentadon ĉi tie. Manuela Ronco gvidis diskutrondon pri Atentema Kunestado.

Dum IJK la trejnistoj, Stela Besenyei-Merger, Saŝa Kovyazina, Alla Kudrjaŝova, Jérémie Sabiyumva kaj Querino Neto, gvidis la kvintagan trejnadon. Legu pli pri ĝi en la retejo.

Dum KAEST (Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko) Sasha Murr kaj Charlotte Scherping Larsson prezentis la tradukon kaj sciencan fonon de la ludo Tiel la viv', konsciiga ludo pri malegaleco. Paulínka Kožuchová eluzis la oportunon de organizado de projekta renkontigxo samtempe kun Konferenco kaj prelegis pri feminisma epistemologio kaj novaj teĥnologioj de reproduktado. Same Carlos Pesqeura Alonso decidis prelegi pri venontaj sociologiaj Esperantaj studoj. Ene de laborgrupoj projektaj partoprenantoj pridiskutis formon kaj enhavon de flugfolioj pri "Atentema kunestado" kiujn ni volis printi kiel parton de fina projekta produkto kaj reuzi dum la ontaj esperantaj arangxoj. Alia laborgrupo dedicxis sian tempon al "kurso de flirtado", pli konkrete al "kiel diri ne kaj kiel akcepti ne dum flirtado".

Dum JES estis prezentita la flugfolioj pri "Atentema kunestado", kion vi povas alŝuti de la ilaro. Manuela Ronco prelegis pri konsento kaj Saŝa Murr prezentis la projekton. Kadre de la projekto estis kreita la retpaĝo kie vi povas vidi ilojn por pli egalecaj kongresoj kaj eventoj.

## Volontula Lingvoinstruado (LI-projekto)

*raportas Léon Kamenický, projekta kunordiganto (2017-2018)*

La Erasmus+ projekto pri Volontula Lingoinstruado sukcese finiĝis en aŭgusto 2018. Kadre de ĝi okazis ĝis tiam 3 eventoj dum la jaro. Unua estis "enkonduka trejnado" dum JES 2017/18, kiun partoprenis 16 trejnitoj kaj estis gvidita de 2 trejnistoj. En marto 2018 okazis semajna trejnadsesio en Tuluzo parelele kun SEMEO. Gastigis ĝin Esperanta Kulturcentro Tuluzo. Krom trejadsesioj la trejnitoj havis okazon partopreni en la bunta programo de SEMEO kaj ankaŭ praktiki nove

akiritajn konojn kiam liverante fulmlecionojn en loka “rifuĝintejo.” La tuto finigis per lasta projekta evento dum SES 2018 kie la trejnitoj resumis la projekton, finfaris materialon por la intelekta produkto, gvidis paroligajn rondojn kaj ricevis atestilojn. Entute la kunlaboro inter TEJO kaj ĈEJ kiel kunordiga organizo kunportis pli ol 10 novaj aktivuloj kiuj kapablas post la projekto gvidi kurson aplikante bazajn metodologiajn konojn. Jen detala raporto pri fluo de la projekto.

## Talento

*raportas Charlotte Scherping Larsson, respondeca estrarano (2017-2018)*

Ni ne sukcesis zorgi pri engaĝi junajn amikojn de Esperanto en la movado. Mi ne volis kontakti ilin sen havi pretan datumprotektan politikon (vidu alian parton de ĉi tiu raporto), ĉar tio povas iĝi ege kosta por TEJO. Pri komunikado kun membroj estis inter alie uzata TEJO Telegrame, babilejo en la tujmesaĝilo Telegram.

Pri membrokvanto ktp. oni ne enmetas en la jarraporto. Ĝenerale la nombroj ne estas tiom bonaj kaj indas kaj subteni la landajn sekciojn pri varbado, kaj videbligi profiton de TEJO-membreco al eblaj membroj tutmonde.

Dum 2018, estis defia tasko kunordigi volontulojn, kaj la emo krei novajn utilajn rimedojn estis perdita pro la neceso, zorgi pri baze akcepteblaj kondiĉoj dum la volontulado, kio ankaŭ ne estis tiom sukcesa.

En septembro 2018 estis komunikado inter mi kaj Kingslim, la novelektita estrarano, por okazigi skajpkunsidon por transdono. Nenio okazis. En 2019 mi parolis kun ĵus elektita Tomáš, kaj komencis transdonon kun li.

Mia Nordentoft, volontulo, faris “TEJO sinprezentas” dum JES 2018.

# Parto 3: Interesgrupoj kaj Servoj

## Adoleska agado

*raportas Charlotte Scherping Larsson, respondeca estrarano (2017-2018)*

En ĉi tiu kampo nenio okazis. Estis diskuto pri fermo de la kampo, sed kiam ni identigis en kia aĝo kelkaj el niaj plej fortaj landaj sekcioj atingas junulojn, evidentiĝas ke 16-jaruloj estas gravaj. Espereble aliaj estraroj sukcesos estontece zorgi pri la interesgrupo.

## Edukado

*raportas Karina Oliveira, Komisiito pri Edukado (2018-2019)*

*mankas raporto de Hoan Tran (Ĝojo), respondeca estrarano (2017-2018)*

*mankas raporto de Hans Becklin, respondeca estrarano (2018-2019)*

Por la unua fojo, okazis KER-ekzameno dum IJK. Legu raporton pri la sesio ĉe la retejo de Edukado.net.

### ILEI-Konferenco

Mi partoprenis kaj reprezentis TEJO-n en la ILEI-konferenco 2018, kiu okazis en Madrido, de la 20 ĝis la 28 de julio. Estis kunveno kun la estraro de ILEI por ekpripensi eblan kunlaboron inter la du organizoj, kaj ILEI proponis ke mi iĝu komisiito de la organizo pri junulara agado, kaj samtempe estis la ideo ke mi iĝu komisiito de TEJO pri Edukado, tiel ke mi povus esti la ligo inter la du organizoj. En la konferenco apenaŭ partoprenis junulojn, tiel, ekestis la zorgo trovi manieron allogi pri la junaj membroj al la organizo kaj al la evento mem.

## Genra egaleco

*raportas Charlotte Scherping Larsson, respondeca estrarano (2017-2018)*

*mankas raporto de Olga Sevcenco, respondeca estrarano (2018-2019)*

Ĉefaj taskoj de la estrarano estis roli kiel referencpunkto pri egalecaj temoj. Ekzemple venis peto, okazigi trejnadon por anĝeloj kaj konsciigi ilin pri temoj rilate al pluraneco kaj diverseco dum SES. Mi komunikis kun Manuela Ronco, kiu okazigis sesion pri tio. En 2018 Marko Konijnenberg kaj Jana Suna iĝis komisiitoj pri egaleco. Marko faris mallongan parolon pri konsento kaj respekto en la komenco de KKPS 2018. La mesaĝo ankaŭ uzeblas dum aliaj eventoj. Legu la alparolo ĉi tie. Jana kaj Marko faris sesion pri sekura seksumado dum JES 2018.

Estas bezonata, ke iu en la estraro okupiĝas pli pri la temo de egaleco, por certigi ke egalecaj kaj pluranecaj temoj estu traktitaj en ĉiu kampo de TEJO-aktiveco. Kiam venas demandoj pri konsciigaj paroloj kaj bezonata vidpunkto de tiu temo, estas bezonata havi spertulon pri tio. La celo ne estas anstataŭi grupojn kiel

Egalecen, sed gravas havi vidpunkton por ebligi veran tutmondecon kaj tolerecon en nia organizo.

Tiucele, jen nova parto de la Jarraporto: analizo de TEJO de egaleca vidpunkto. Ĉu TEJO kaj la movado estas alirebla kaj inkluzivema?

Ĝenerala TEJO-membreco laŭ genro estas ĉirkaŭ 61 % iĉoj, 34 % inoj kaj 5 % kun neregistrita genro (ĉefe ne pro neduuma identiĝo sed pro manko de informoj en la datumbazo). La kvantoj de membroj, kiuj aliĝas pere de Fondaĵo Canuto kaj estas iĉoj, estas 65%. Sen Fondaĵo Canuto-membroj, la procentaĵoj estas 60% iĉoj kaj 36 % inoj.

## Kulturo

*raportas Charlotte Scherping Larsson, respondeca estrarano (2017-2018)*

*mankas raporto de Hans Becklin, respondeca estrarano (2018-2019)*

Ne multe okazis en ĉi tiu kampo dum 2018. Olga Shiliaeva, komisiito pri SFA, vojaĝis al Ĉinio por prilabori la filmfestivalon “Teo kaj amo”.

## Moviĝeblo

*raportas Konstanze Schönfeld, respondeca estrarano (2017-2018)*

En 2018 ne okazis trajna karavano al IJK, sed busa. La respondeculo, kiu kontaktis busfirmaojn kaj organizis la pagojn estis Antonia Montaro el Svedio. La karavanoj, kiuj ekis de Lisbono kaj Madrido, estis tre sukcesaj, rapide forvendiĝis kaj eĉ alportis financan gajnon.

Kiel kutime organiziĝis kaj sukcesis trajnkaravano el Nederlando kaj Francujo al JES 2018/19 kaj reen, kun ĉirkaŭ tridek partoprenantoj kune.

## Pasporta Servo

*raportas Charlotte Scherping Larsson, provizore respondeca estrarano (2018), kaj Baptiste Darthenay, ĉefprogramisto de la retejo kaj respondeca komisiito (2019)*

*mankas raporto de Arturo Crespo, respondeca estrarano (2018)*

Post malaktiveco de la respondeca estrarano Doniben, Charlotte kreis babilejon kun kelkaj PS-aktivuloj en Telegramo por iom kunordigi kaj kompreni la laboron pri Pasporta Servo. Ŝi provis zorgi pri baza informado pri la bezonoj de la aktivuloj kaj enplekti novajn aktivulojn. Kelkaj aktivuloj aliĝis kaj foriris pro manko de gvidado. Estis bezonata aktiva komisiito pri PS, kaj Charlotte ne trovis respondeculon. Paul Helly, volontulo de TEJO, estis engaĝita en lerni la sistemon uzata por PS kaj aktivis en la teknika parto de la programo. Li lernis de Baptiste Darthenay, antaŭa (kaj en 2019 nomumita komisiito pri PS).

En septembro, estis komencita la transdono de la fako al respondeca estrarano kaj Arturo komunikis kun la aktivuloj en la babilejo kaj estis informita pri la neceso je gvidado kaj plano de la estraro por la projekto.

Dum la unua parto de la jaro, la komunikado kun la uzantoj de Pasporta Servo faris Paul Helly kaj Marc Konijnenberg, kun helpo de Stela Besenyei-Merger kaj mi mem. Dum la dua parto de la jaro ĉefe Meiyer Gören zorgis pri la retmesaĝoj.

Krom kosmetikaj ŝanĝoj kaj plibonigoj en la kodo kaj servilo, Meiyer Gören enkondukis grandajn ŝanĝojn rilate al la eŭropa regularo ĜDPR. Tiel, la uzantoj ricevas sciigon pri kiujn informojn la retejo enhavas kaj kial. Plie, la sistemo donas pli da eblecoj al la uzantoj redakti kaj forigi siajn datumojn.

Dum IJK 2018 okazis laborgrupo pri Pasporta Servo kies partoprenantoj estis Ĝojo, Mia, Lars, Christine, Stela, Baptiste kaj Paul (protokolanto). Tiam evidentiĝis ke la rimedoj kiuj estas bezonataj por la projekto kaj tiuj kiuj estas disponeblaj ĉe TEJO malsamas. Jen protokolo.

## Scienca kaj Faka agado

*raportas Konstanze Schönfeld, respondeca estrarano (2017-2018)*

*mankas raporto de Hans Becklin, respondeca estrarano (2018-2019)*

Bedaŭrinde, krom kelkaj disaj prelegoj pri sciencaj temoj dum junularaj aranĝoj, ne okazis ajna strukturigita agado el tiu ĉi interesgrupo en 2018.

# Anekso

## Mallongigoj

### Kromnomoj de personaj nomoj

| | |
|---|---|
| Ariel | Ariel Palmer |
| Charlotte | Charlotte Scherping Larsson |
| Feliĉa | Mung Bui |
| Ĝojo | Hoan Tran |
| Tuŝka | Konstanze Schönfeld |

### Mallongigoj de organizoj kaj organoj

| | |
|---|---|
| **AC** | Advisory Council<br>*(KonsilKonsilio pri Junularo de Konsilio de Eŭropo)* |
| **AEGEE** | Association des Etats Généraux des Etudiants de l'Europe<br>(*Eŭropa Studenta Forumo)* |
| **AEJK** | Afrik-Eŭropa Junulara Kapabligo |
| **AKE** | Afrika Kongreso de Esperanto |
| **AL** | Araba Ligo |
| **AT** | Aktivula Trejnado |
| **BEST** | Board of European Students of Technology<br>(*Eŭropa Konsilio de Teknologiaj Studentoj*) |
| **CO** | Centra Oficejo de UEA/TEJO (Roterdamo) |
| **COP22** | Klimatkonferenco de la Unuiĝintaj Nacioj de 2016 |
| **DEAR** | Development Education and Awareness Raising |
| **EACEA** | Education, Audiovisual and Culture Executive Agency |

| | |
|---|---|
| | *(Eduka, Aŭdvida kaj Kultura Plenuma Agentejo)* de EU |
| **ECAS** | Eŭropa CivitanAgada Servo |
| **ECY** | Effective Communication for Youth<br>*(Efika komunikado)* |
| **EJF** | Eŭropa Junulara Fonduso |
| **EJO** | Eŭropa Junulara Okazaĵo |
| **EKOSOK** | EKOnomia kaj SOcia Konsilio de Unuiĝintaj Nacioj |
| **EPLM** | European Platform for Learning Mobility |
| **ETEY** | Empower Trainers, Empower Youth *(Trejnado por trejnistoj)* |
| **EU** | Eŭropa Unio |
| **EVS** | Eŭropa Volontula Servo |
| **FEJ** | Filipina Esperanto-Junularo, *aŭ*<br>Florigu Egalecon inter Junuloj (projekto kadre de Erasmus+) |
| **FLOM** | Fortoj-Lamaĵoj-Oportunoj-Minacoj |
| **FoJE** | Forumo Junulara Eŭropa |
| **FTP** | File Transfer Protocol (*DosierTransdona Protokolo)* |
| **IJF** | Internacia Junulara Festivalo |
| **IJK** | Internacia Junulara Kongreso |
| **IKRJO** | Internacia Kunordig-Renkontiĝo de Junularaj Organizoj |
| **ILEI** | Internacia Ligo de Esperanto-Instruistoj |
| **ISAE** | Internacia Scienca Asocio Esperanta |
| **JES** | Junulara Esperanto-Semajno |
| **JOTE** | Junulara Organizo de Togolandaj Esperantistoj |
| **KAEST** | Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko |

| | |
|---|---|
| **KdE** | Konsilio de Eŭropo |
| **KER** | Komisiono pri Eksteraj Rilatoj |
| **KKPS** | KlaĉKunveno PostSomera |
| **KODEJO** | KOmpleta Demandaro por Esperantaj Junularaj Organizoj |
| **LA** | Landa Asocio |
| **LKK** | Landa Kongresa Komitato |
| **NA** | Nacia Agentejo |
| **NRO** | NeRegistaraj Organizo |
| **SFA** | Scienca kaj Faka Agado |
| **TA** | TEJO Aktuale |
| **TEJO** | Tutmonda Esperantista Junulara Organizo |
| **TT** | TEJO Tutmonde |
| **UEA** | Universala Esperanto-Asocio |
| **UK** | Universala Kongreso |
| **UNITED** | Unuiĝintaj por Interkultura Agado |
| **WOSM** | World Organization of the Scout Movement<br>*(Monda Organizo de la Skolta Movado)* |